

# LITERATURA

redaktoro: K. Kalocsay

# MONDO

Literatura, arta ilustrita revuo

Dua periodo — Tria jaro

Senpaga kvaronjara aldono:

**Bibliografia Gazeto**

En duona formato 16—20 paĝa



Julio 1933

7-a numero

plou  
1933

**Responda redaktoro: Karlo Bodó**

**Redaktoroj: Francisko Szilágyi kaj Ludoviko Totsche**

**ĈEFKUNLABORANTOJ:** J. D. Applebaum (Liverpool), A. Behrendt (Berlin), P. Bennemann, (Leipzig), J. Berger (Köln), S. Bartha (Budapest), J. Grau Casas (Mediona), Helmi kaj Hilda Dresen (Tallinn), Stellan Engholm (Nyberget), Jean Forge (Bydgoszcz), S. Grenkamp Kornfeld (Paris), Ladislao Halka (Budapest), N. Hovorka (Wien), R. Hromada (Praha), W. B. Johnson (Kairo), Teo Jung (Köln), I. Yurista (Czesztohowa), F. Karinthy (Budapest), E. Knutsson (Malmö), I. Lejzerowicz (Lodz), W. Lippmann (Leipzig), Miłoś Lukáš (Trnava), A. Mazzolini (Fano), T. Morariu (Cluj), L. N. Newell (Birmingham), P. Nylén (Stockholm), Jan van Schoor (Antwerpen), E. C. Stillmann (U.S.A.), K. R. C. Sturmer (London), R. Schwartz (Paris), J. Šimomura (Tokio), L. E. Thomson (Pymble, Aŭstralio), G. Waringhien (Lille), Leono Zamenhof, Feliks Zamenhof kaj Lidja Zamenhof, E. Wiesenfeld (en Warszawa) kaj aliaj.

**Averto:** Manuskriptojn la redakcio ne redonas. La rajton, fari en ĉiu ensendita manuskripto stilajn korektojn la redakcio rezervas por si, se la verkinto aŭ tradukinto anticipe ne protestas.

La redakcio akceptas nur unufanke maŝinskribitajn artikolojn kun sufiĉe larĝaj margenoj kaj liniaj interspacoj. Escepte tamen estas akceptataj manuskriptoj kun *deseĝnitaj* aŭ tre klare skribitaj literoj.

## NIAJ ELDONAĴOJ

### Verkoj de JULIO BAGHY:

Dancu Marinetoj, noveloj	tolb. 5.40,	broŝ. 3.40
Migranta Plumo, noveloj	tolb. 4.60,	broŝ. 2.70
Viktimoj, romano	--- tol. 7.40, duont. 5.60,	broŝ. 5.-
Hura! romano	--- tol. 10.-, duont. 8.40,	broŝ. 7.40
Preter la vivo, poemaro	tolb. 3.-,	broŝ. 2.-
Pilgrimo, poemaro	--- tol. 3.-,	broŝ. 1.80

### Verkoj de KOLOMANO KALOCSAY:

Lingvo, Stilo, Formo	--- tol. 4.90	broŝ. 3.-
Malkara eldono	bind. 2.50	broŝ. 1.50
Streĉita Kordo	--- tol. 5.80	broŝ. 4.-
Rimportretoj	--- tol. 4.60	broŝ. 3.-
Eterna Bukedo. Internacia poemantologio.	352 paĝa	Duont. de bindita 11.30
Madách; Tragedio de l' Homo	luksa 5.50, simpla	4.-
Petőfi; Johano la brava	--- bind. 3.-	broŝ. 1.50
Goethe; Romaj elegioj; La Taglibro, silkebind.	5.-	broŝ. 2.-
Hungara Antologio	--- bind. 14.-	broŝ. 12.-
K. Kalocsay - G. Waringhien: Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro	--- bind. 5.-	broŝ. 3.60

### ALIAJ VERKISTOJ:

J. Forge; Mr Tot aĉetas mil okulojn	--- Romano	--- bind. 5.80	broŝ. 4.-
Francisko Szilágyi; Poemaro el Hungarlando	--- bind. 2.50	broŝ. 1.50	
Francisko Szilágyi; Trans la Fabeloceano	--- bind. 5.-	broŝ. 3.-	
Szilágyi; La Simpla Esperanto (gram. por hung.)	broŝ. 1.35		
Teodoro Schwartz; Modernaj Robinzonoj	broŝ. 1.50		
La Pentroarto en la malnova Hungarujo, kun 96 ilustraĵoj	--- duonlede bindita	15.50	
L. Totsche; De Paĝo al Paĝo	--- bind. 5.-	broŝ. 2.50	
Engholm; Homoj sur la Tero	--- bind. 5.-	broŝ. 3.60	
Kenelm Robinson; Homarisma Laboro	broŝ. 0.60		
I. Ŝirjaev; Peko de Kain	--- broŝ. 1.-		
Hungara Ŝlosilo	--- 0.18		

### Prezoj en svisaj frankoj!

Aldonu 10% por sendkostoj

## Universala Esperanto Asocio

### celas:

*Disvastigi* la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto.  
*Pifacilig* la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

*Krei* internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio.

*Kreskigi* inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon por fremdaj popoloj.

La Asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko.

### donas:

*Al la membroj:* Membrokarton kaj kvarcentokdekpaĝon Jarlibron kun la adresoj de la Delegitoj, Esperantistaj grupoj, gazetoj, organizaĵoj, kun sciigoj pri internaciaj rilatoj ktp.

*Al la Membro-Abonantoj:* Krom tio la gazeton »Esperanto«, internacia ĉeforgano de la Esperantistoj, kun artikoloj literaturaj, sciencaj, teknikaj kaj precizaj informoj pri la movado.

*Al la Subtenantoj:* Krom ĉiuj dokumentoj, kiujn ricevas Membro-Abonanto, premion konsistantan ol la Esperanto-literaturo.

Ĉiu aliĝinto rajtas presigi senpage korespondan anonceton unufoje en la gazeto »Esperanto«.

### kaj postulas nur modestan kotizon

de 5 Fr. por Membro, de 12,50 Fr. por Membro-Abonanto kaj de 25 Fr. svisa valoro por Membro-Subtenanto.

# HYAMS — UTOPIISTO

— W. B. Johnson —



Ĉiu reforma ideo, eĉ plej milda, principe kontestas la sanktan aŭtoritaton de Reĝo-tradicio kaj sekve insidas kontraŭ lia tuta regado, preparante la vojon por Reĝo-racio. Viando, tabako, alkoholo, ĉapeloj, kapitalismo kaj eĉ la Dio prapatra povas kandidatiĝi por ekzilo ĉe menso, kiu jam kondamnis ekzemple la vivisekcion. Jen kial ĉiu reforma movado estas varmo-bedo por tiaj »maniuloj«, kiuj formas la spritkapitalon de la tutmondaj Schwartz-oj. La ĝisosta reformemulo mense forviŝas la diktojn de la pasinteco kaj komencas ĉion reskribi sur novaj paĝoj. Estas absorba ludo rekrei en sia kapo la novan ordon. Eĉ la skeptika Omar Khayyám konfesis sopiron remuldi nian universon:

»Se tutan monduŝon, karulin',  
Ni povus ĉirkaŭkapti per Destin',  
Ĉu ni ne volus ĝin frakasi kaj —  
Refari ĝin laŭ nia korinklin'?»

(Laŭ angla traduko de E. Fitzgerald.)

Sed ĉar la universo estas iom vasta, la homoj ordinare kontentigas per klopodo realigi sian idealon en ia mikrokosmo: la geedzoj — hejme, la agitisto — socie, kaj la artisto — en sia verko. Kaj tial ke la Vivo emas imiti la Arton, la artisto ofte montriĝas kiel plej efika agitisto. Ĉar la arto estas vivkritika spegulo, tiusence ĝi estas reformema.

Pure reformismaj estas la utopiaj verkoj, kiuj abundas en la monda literaturo sub nomoj de Platono, Campanella, Fénelon, J. J. Rousseau, Hertzka, More, Wells kaj multegaj plu. Ne estas do mirinde, ke tre frue aperis utopiaĵo en la originala literaturo de reformula movado, kia Esperanto. Ĝi estas la romano, »Nova Sento«, kiun Henry B. Hyams publikigis en 1915 sub sia plumnomo, »Tagulo«.

Estante arkitekto, li certe sekvis profesion, kiu konvenis al lia artista naturo kaj multe influis lian vivkoncepton; ĉar li ŝajne rigardis la homojn kvazaŭ masonistojn de malsanaj korpo, socio, civilizo kaj kulturo, kiuj fuŝis la belajn planojn de la Granda Ĉefarkitekto. Li do prenis ilojn de sia metio kaj skribdesegnojn ĉion, kia ĝi ideale devus esti, kaj la rezultato estas »Nova Sento«. Evidente lia idealismo havis artisman impulson, ĉar la sociaj kaj individuaj malperfektoj de la homoj ofendis lian belsenton; kaj fundanalize tio estas verŝajne la bazo de ĉia idealismo.

Estante londonano, li elektis tiun urbegon por la malferma sceno de sia romano, kiu vidigas ĝin al ni tra la okuloj de senlabora maŝinisto. Jen tute laŭcela komenco, ĉar antaŭ ol proponi la novan ordon, necesas kondamni la malnovan; kaj oni ne povus pli efike, ol atestigi malsatan viktimon de kapitalisma metropolo. (Mi scivolas, kial li ne rakontigis ankaŭ kapitaliston kiel atestanton por la defendo; sed tio estas nura parentezo.) En la samaj ĉapitroj Tagulo plektas cirkonstancojn, kiuj ebligas transporti la viktimon sur Marson, planedon ŝatatan de multaj utopio-verkintoj.

La mondo estas terurita pro la alpaŝigo de fremda planedo, kiu minacas la teron ĉiutage pli proksime. Ĉu ĝi disfrakasos la terglobon? Ĉu ĝi preterflugos sen gravaj detruoj? Verŝajnas, ke ĝia altira forto ŝanĝos la teran akson kaj alproksimigos Marson.

Gillett, la maŝinisto, kiu senlabore stratumas, povas observi la alfluganton kaj ĝian efikon sur diversajn homspecojn. Liaj pripensoj klare spegulas la socialisman kaj pacisman tendencojn de la aŭtoro, kiu mem dum la milito estis ŝtata malliberulo pro sia kontraŭmilita agitado. Gillett rimarkas interalie, ke la proletoj estas tiel kutimigintaj al siaj laborkatenoj, ke eĉ la minacanta pereco ne povas interrompi ilian sklavan rutinon, kaj okaze de tiu observo, la aŭtoro atakas kutimojn per vortoj, kiuj forte memorigas pri simila penso en la fama Madách-dramo: »La tragedio de l' Homo.«

*Tagulo:*

»Kvankam ekzistis bonaj kutimoj, tamen ili baldaŭ eluziĝis, kaj gradon post grado fariĝis baroj sur la evolua vojo al la beleco.«

*Madách:*

»Ĉio vivanta, bene efikanta  
Post tempo mortas; la anim' forflugas,  
La korp' transvivas kiel abomena  
Kadavro haladzanta mortmiasmojn  
En nova mond' ĝerminta ĉirkaŭ ĝi.«

Intertempe Gillett akiras laboron ĉe aviadisto, kiu deziras maŝinistan kunulon okaze de flugveturo al Germanujo, sed dum tiu flugo ili ambaŭ pereas pro ventegoj, alportitaj de la fremda planedo.

Ilia morto fermas, por tiel diri, la unuan akton, kaj kiam la kurteno releviĝas, ni trovas Gillett'on jam sur Marso, kiun la preterfluganta planedo altiris tre proksimen al la Tero. Pri siaj teozofiaj konvinkoj la aŭtoro povis, sen troa perforto al sia racio, transigi la animon de la mortinta maŝinisto en la korpon de plenkreska marsano. Guste tiu kredo al reenkarigi koloras la tutan vivkoncepton de Tagulo. Akceptinte kiel nepran premison, ke ekzistas reganta Dio, kiu estas »justeco mem«, li devis iel forargumenti evidentajn maljustaĵojn, kiuj okazas en la naturo; kaj la teozofio, li kredis, donas la necesan klarigon. Tiu pensmaniero diluis la realismon de lia verko per malklara mistiko.

Memorante, kiom da mizero malbeligas la teran civilizon, Gillett povas dece ŝati la marsan utopion, kies ĉefa trajto estas simpleco. Absolute ĉion oni simpligis, de siaj vestoj ĝis la ŝtata administrado, kio estis ebla ĉar la marsanoj delonge rezignis pri multego da aferoj, kiujn homoj trovas necesaj. Kaj tiu simpliga rezignemo estas la esenco de la Tagula filozofio.

# Subkarpataj rakontoj

— Anton Jandík —

Plenluno lumigis per sia ĉarma brilo la dehakitan arbaron, kies tero estis kovrita de ĉiuspeca arbustaro, multkoloraj floroj kaj herboj. Ni sidis ĉirkaŭ fajro apud krude konstruita trabkonstruaĵo kaj silente rigardis la flamojn. La varma aŭgusta nokto strange impresis min, homon urbanan, kiu ne estis kutimiginta al tia laŭnatura vivo, kian mi vivis de unu monato en la vastaj karpataj montarbaroj, tranoktante en la arbaroj post taga vagado, sen molaj kusenoj kaj kutima komforto.

La trankvilego de tiuj arbaroj fortigis miajn nervojn kaj mi sentis min tiom feliĉa, kiom neniam antaŭe. Dum krepusko mi atingis la trabkonstruaĵon, ĉe kiu kristale pura akvofonto oferis al mi refreŝigon.

Ni estis nune kvar. Tri ĝendarmojn mi renkontis, kaj ni ĉiuj ripozigis kaj la ĝendarmoj preparis sin tiel al tutnoka rondirado.

»Jam la dekan jaron mi vivas inter tiuj ĉi montoj kaj popolo«, ekparolis unu el la ĝendarmoj. »Mi ĉiam ja grumblas kontraŭ tiu ĉi lando, pro mia malfacila tasko ĉi tie, sed, verdire, tamen malgraŭ ĉio, dolore mi adiaŭus al la lando. La arbaroj kaj fine ankaŭ tiu popolo kreskis jam al mia koro.«

»Jes, la popolo«, enparolis la dua, »la popolo vivas mizere. Oni ja ne povas diri, ke ĝi ne estus civilizita, se oni komprenas per tio fumadon de Dio scias kiaj foliaroj, trinkadon de brando kaj aliajn »bonaĵojn«. Sed la kulturo pene penetras ĉi tieajn vilaĝaĵojn. Mi povas rakonti nun instruan historieton pri tio, ĉu ne?«

»Ĉu vi aludas tiun historion kun la ŝmiraĵo?« demandis lin la tria, belkreska kaj juna ĝendarmo.

»Mi ne konas la historion«, mi demandis; »ĉu vi povus ĝin rakonti al mi?«

»Do, tiu historio ŝajnas estas kopiita el Jack

London, kaj se iu estus ĝin rakontinta al mi antaŭe, mi estus tuj dirinta al li tion. Sed bedaŭrinde, ĝi estas tro vera, ĉar ĝis hodiaŭ mi havas pri ĝi klopodojn«, komencis la dua.

»En mia vilaĝo vivis riĉa kamparano Opálenik. Li estas ne malriĉa homo, posedanta belan mastrumadon, multan brutaron, fekundajn kampojn en la valo kaj nenio ŝajnis manki al li por la bonstato.

Lun tagon ŝajnis al li, ke en lia gorgo ne estas io en ordo. Li sentis ian gratadon tie, li ne povis bone engluti la mangon, io lin premis. Ankaŭ la kapo doloris. Mi ne estas kuracisto, mi ne scias, ĉu vere li havis ian anginion, sed li plendis ankaŭ al mi pri siaj malagrablaĵoj.

Lia bofrato Jura Tomašik havis en tiu ĉi tempo viziton. Vi scias ja, ke de la rutenoj vivas la duono ĉi tie en Subkarpata Rusujo kaj la duono en Usono. Do venis la frato de Jura por transpreni kaj vendi la heredaĵon post sia patro.

Dimanĉe venik Opálenik viziti Jura'n. La amerikano sidis apud la tablo kaj aŭskultis la interparolon, enmiksante sin per kelkaj saĝaj vortoj kaj »eldiraĵoj«, kiel taŭgas por mondvojaĝulo.

Opálenik plendis pri siaj malsanaj gorgo kaj kapo kaj priskribis siajn dolorojn kaj ĝenaĵojn.

»Mi riĉe rekompencus tiun, kiu povus min liberigi de mia malsano«, li finparolis.

»Hm«, diris pripenseme la amerikano, »estas facila afero. Se vi havas monon, mi povas helpi al vi. Ĉe ni en Ameriko ni havas bonan kaj neniam malsukcesan rimedon, kiun mi povas al vi prizorgi. Ĝi ja kostos monon, sed mi povas al vi garantii, ke vineniam malsaniĝos. Ekzistas ĉe ni ŝmiraĵo, farita el amerikaj herbaĵoj, per kiuj sufiĉas nur ŝmiri la kolon, kaj vi estos sana por la tuta vivo. Sed oni devas unue dehaki

Swift ie skribis, ke »amuzado estas la feliĉo de tiuj, kiuj ne povas pensi«, kaj Tagulo opinias, ke progresinta spirito nature forlasas ankoraŭ multon krom amuziloj. Trovante interne tion, kio feliĉigas, ĝi suriras la »vojon rezignan«, sur kiu materiaj ambicioj kaj egoisma akiremo cedas lokon al spiritaj valoroj kaj kolektivismo. Estas certe, ke la plej gvidantaj spiritoj preskaŭ ĉiam emas al simpla vivo, kaj la alte evoluintaj utopianoj de Hyams komune atingis la vojon de rezigno. Variecon de vestmodoj kaj manĝoj ili ne bezonis. Tabakon, alkoholon, teatrojn, dramistojn, sensacieman gazetaron, naciajn armeojn kaj kapitalisman ekonomion ili forigis kiel tute superfluaĵojn kaj malutilajn.

La ideoj de Hyams estas evidente influitaj de la Platona »Respubliko« kaj de aliaj utopiaj verkoj. Estas interese noti, ke »Nova Sento« pledas por iuj ideoj, kiuj poste trovis pli vastan akcepton, ekzemple virina harmodo moderna, ia Ligo de Nacioj, kaj certaj malliberejaj reformoj. Cetere, la ideala sociordo, kiun ĝi priskribas, enhavas multon, kio parencas al formala komunismo, sed komunistoj konstatas per la plumo de N. V. Nekrasov: »En la fino de sia romano Tagulo sukcesis nenigi ĉiujn pozitivajn flankojn de la verko per neimagebla transkurbigo en mistikan sferon de spiritismo kaj teozofio.

Verkante »filozofian romanon«, kvazaŭ detalan gvidlibron pri sia ideala ŝtato. Tagulo verŝajne elverŝis

sian tutan direndon, kaj ĝuste tial la verko plene respiegulas la siatempan aŭtoron. Ĝi montras lin estetulo, kies sociala kaj mistika filozofio postulis, ke belo konkretigu en la vivo mem per pli sana kaj pli feliĉa homaro, kaj lia estetismo estas tiu de la spiritiĝinta homo, kiu neas la gastronomiajn kaj erotajn plezurojn. Kiom sabre ia Aldous Huxley atakus tian spiritiĝeman aspiron, kiu volas ĝistrunke pritondi la homan fruktarbon profite al unika branĉo! Huxley kaj Hyams, ambaŭ esprimis admiron al la greka kulturo, sed la lasta malkonsekvence neglektis ĝian kulturican politismon. Homaj aspiroj ja estas diferencaj, sed feliĉe tio ne devas ĝeni la verkiston de teoria utopio, ĉar li povas minimumigi internajn konfliktojn, kreante la tutan popolon laŭ sia bildo.

Eĉ la libro-presajo mem estas iel Taguleca. La ĉapitroj estas kape ornamitaj per simplaj sed elegantaj vinjetoj, desegnitaj de la aŭtoro, kaj la larĝmargenaj paĝoj estas delikate verdaj, por okula komforto.

Estis malfacila tempo kiam aperis »Nova Sento«, kaj mi tute ne scias, kian akcepton ĝi renkontis ĉe la tiama esperantistaro, sed ĉiuokaze ĝi meritis aklamon. En nia originala literaturo plifruis ĝin nur kvar gravaj romanoj; nome, tiuj de Vallienne kaj Luyken. sed enhave »Nova Sento« superis siajn antaŭulojn. Vallienne talente distris siajn legantojn, Luyken verkis interese kaj belstile sed eksmode, dum Hyams, malgraŭ sia mistiko, salutis la estontecon.

la kapon, ŝmiri ĝin kaj la kolon per la ŝmiraĵo, surmeti ĝin poste al la kolo, la kapo tuj alkreskos kaj vi estos sana, Mi tion vidis propraokule. Morgaŭ mi forveturos, do post unu, du monatoj vi jam povos havi la ŝmiraĵojn.»

Tre ekmiris ambaŭ kamparanoj pri la mirakla kuracilo kaj Opálenik tuj donis al la amerikano monon por aĉeti kaj sendi la ŝmiraĵon.

Pasis du monatoj. La amerikano efektive sendis la ŝmiraĵon kaj Opálenik petis Jura'n fari, kion diris lia frato. Tiu senhezite, por sanigi sian bofraton, vere, unu dimanĉon, kiam ili soligis en la bieno de Opálenik, prenis akran hakilon kaj preparis la ŝmiraĵon. Opálenik metis fideme la kapon sur lignan blokon, la bofrato streĉis la brakon kun la hakilo kaj per unu lato li forhakis la kapon de Opálenik. La kapo ruliĝis sur la tero, Jura ŝmiris la kolon kaj la kapon per la mirakla ŝmiraĵo, poste surmetis ĝin al la kolo, sed ho ve! ĝi ne volis alkreski. Vane atendis Jura kvaronhoron, tenante la kapon ĉe la kolo de Opálenik. Li fine malesperis, revenis hejmen kaj sin pendigis.

Kaj ni nun serĉas la fraton de Jura en Ameriko. Se mi ne havus ĉiujn dokumentojn pri tio hejme, mi neniam kredus, ke rakonto de Jack London povus esti vera.»

»Jes, tia popolo vivas ĉi tie. Ekstreme fidema kaj malklerega« diris la unua ĝendarmo. »Mi povas tion ankaŭ certigi. Aŭskultu nur mian historieton, okazintan antaŭ unu semajno.

Vi certe aŭdis pri la murdo de Eliáš Hakulín en D... Do, mi estis komisiita kun mia kamarado, esplori la aferon. Ni alvenis al la vidvino de la murdita Hakulín vespere por gardi la kadavron dum la tuta nokto. Ni surgrimpis la fornĉon kaj, por nin endormigi, ni interbabilis. La vidvino de Hakulín estis kun ni en la granda ĉambro.

»Sed tiu homo, kiu mordis Hakulínon, estas nun ŝarĝita de granda peko«, komencis kamarado Novák. »Tiu estos certe post sia morto ege turmentata en la infero.«

»Certe, mi ne volus esti en lia haŭto«, mi rediris, divenante la planon de Novák.

Kaj ni nun komencis priskribi la turmentojn, kiuj atendas la murdinton de Hakulín. Ni elpensadis ĉiun eblan plej teruran turmentaĵon. Duonhoron daŭris nia interparolo, ĝis fine la vidvino ne plu povis tion elteni, kaj ekkriis:

»Ho, silentu nur, mi murdis lin! Dio estu kompatema al mia animo!«

»Mi rakontos al vi ion pli gajan,« diris la tria ĝendarmo, »kvankam ankaŭ el mia servo.«

En la vilaĝo, kie mi nun vivas en ĝendarmejo, vivas maljunulo Pantaleon. Li estas mizerulo, sed antaŭ duonjaro li konstruis al si barakon el argilaj brikoj. Li estis tre fiera pri sia barako kaj, sidante en la gastejo de l' judo, li diris: »Barakon mi havas, nun mi bezonas nur virinon.«

Li efektive elserĉis unu, kvindekjarulinon Marja, kiu havis nenian hejmon kaj vivis el homa kompatemo, sed tamen ŝi estis forta kaj kuraĝa virino, kiu longe ankoraŭ ne opiniis sian vivon plenvivita.

Do, la maljuna sesdekkvinjara Pantaleon venis al Marja kun sia peto. Marja pripensadis kaj fine konsentis. Sed la grizhara kaj kurbeta Pantaleon devis aĉeti liton kaj kusenon kaj konstrui ankaŭ fornĉon, kiujn aĵojn ĝis nun li ne havis en sia barako. Poste li devis subskribi al Marja paperon, de Marja propra-

mane skribitan, ĉar sciis, ke Marja lernis skribi kaj legi, kiel vi scias. Pantaleon ne scipovis tiun arton, li lernis nur subskribi sian nomon per grandaj zigzagaj literoj.

»Pantaleon, por ke vi sciis, kio estas sur la papero, mi legos tion, kion vi subskribos, male vi poste dirus, ke vi nekonscie subskribis:

Mi, Pantaleon Karbovanec proprvole donacas al Marja Huleja mian barakon por ŝia tutviva uzo kaj loĝado.»

»Jes, bone, mia Marja, ĉion mi faros por vi,« parolis la enamiĝinta Pantaleon, farante sian subskribon.

Sed jam la unuan tagon, kiam li prenis Marja'n al si, ŝia feliĉo malsereniĝis, ĉar Pantaleon foriris en la gastejon por la kutima gluto da brando. Kiam li malfrue revenis, Marja tre malkontentis.

Post kelka tempo stratvendisto Mustanoviĉ komencis vizitadi Marja'n dum la foresto de Pantaleon.

Okazis foje, ke Pantaleon revenante hejmen el la gastejo, vane klopodis malfermi sian barakon.

Li enrigardis tra la fenestro kaj ekvidis sian Marja'n, kuŝantan kun Mustanoviĉ. Pantaleon faris bruegon kaj kriis. »Malfermu mian barakon, alie mi vin ambaŭ mortigos. Kaj tiu kanajlo malaperu!«

»Foriru, maljunulo!«, ekkriis Marja. »Tio estas mia barako, ne ĝenu min, mi volas dormi.«

Kaj ili ne enlasis la kompatidan Pantaleon'on. Fine li devis foriri kaj dormi sur la herbaro.

Sed frumatene li leviĝis kaj iris al la vilaĝestro. Vi scias, ke en vilaĝo oni frumatene levigas, precipe somere, kaj la vilaĝestro estis jam laboranta, kaj vivinte en urbo, kio estas maloftaĵo en ĉi tieaj vilaĝoj,



Grigorescu

La paŝtisto.

# Hungara Antologio

— G. Waringhien —

## II.

Estas konata fakto, ke en ia ajn literaturo prozo disvolviĝas kaj maturiĝas nur longtempe post poezio; junaj popoloj esprimas sin verse, kaj ofte kreas verajn ĉefverkojn, dum ilia prozo estas ankoraŭ mallerta, implika kaj preskaŭ infana. En la franca literaturo oni devas atendi ĝis Montaigne kaj Rabelais por ĝui prozajn admirindajn monumentojn, t. e. kvar jarcentojn post la apero de la unua granda poemo, la Rolandkanto. Krom Luther, kies kazo klariĝas per neliteraturaj cirkonstancoj, la germana prozo komenciĝas nur kun Goethe. Ne estas do mirinde, ke en Hungarujo, kie la poezio ekfloradis nur ĉirkaŭ la 19-a jarcento, la prozo liveras nur en tre moderna tempo rimarkindajn fruktojn. Kaj malgraŭ la tre alta nivelo de kelkaj romanoj aŭ novelaroj oni devas rekonii, ke ĝis nun Hungarujo donis al Eŭropo nenium internacian genion, kiel faris — intence mi ne citas el la ĉefliteraturoj — Norvegujo kun Ibsen, Danujo kun Andersen, Provenco kun Mistral kaj ĵuse Ĉeĥoslovakujo kun Hasek. Sed nun la necesaj kondiĉoj, por ke montru sin tia genio, ekzistas ĉiuj: multaj interesaj verkistoj akumulis en la literaturo sufiĉe da mondoobservoj, da animalizoj, da morstudoj por ebligi la aperon de grandstatura romanisto; kaj en la Antologio, almenaŭ du verkistoj provas al ni, ke ili kapablas skribi tiun artan stilon, sen kiu ne ekzistas altvalora prozaĵo. Mi aludas Mihály Babits (mihaj babiĉ) kaj Dezső Szomory (deĵe somori). Babits, kies romanon talenton ni konas per lia tiel impresa verko, jam esperante tradukita, la »Cikoni-Kalifo« — unu el la libroj, kiuj stampiĝas en la animon kaj ne plu foriĝas el ĝi, — Babits prezentas al ni tie ĉi longan novelon, kun titolo »Mitologio«. Nenion pli largospiran, pli sovaĝodoran, pli eposan mi legis ol tiu peco. Certe ĝi iom memorigas la »Centauron« de Maurice de Guérin, sed tiu lasta estas pli filozofiema, pli revplena, ol la brilega peco de antikva bareliefo, kiun alportas al ni Babits. La »Centauron« de Guérin estas panteista himno al la naturo. »Mitologio« de Babits estas la laŭdo de la humaneco, en sia plej tipa ekzemplero, Heraklo. Vi eble memoras, ke jam la hel-

enaj stoikanoj konsideris Heraklon kiel simblon virtomodelon: la fablo de Heraklo hezitanta inter la du vojoj, inter la virto kaj la malvirto, estas sufiĉe signifa pri tio. Tiun antikvan miton Babits renovigis, realigante per la potenco de imago, kiu ne estas malsupera al tiu de Kipling en la Gangallibroj, scenojn el la vivo kaj laboroj de Heraklo. Tiu ĉi pelĉasas la Apron de Erimanto, kaj dum lia pelado li renkontas la preskaŭ senvivan korpon de bela junulo, Hilar. Li savas lin, amas lin kaj edukas, ĝis la knabo malaperas, logita de la nimfoj kaj de la volupto. Heraklo, serĉante lin, eniras en la groton de la Centaŭro Folos, kaj invitita de li, partoprenas grandan orgion; sed la aliaj centaŭroj alvenas, logitaj de la vinodoro, kaj la diboĉo finiĝas per terura batalo. La vino bestigis la centaŭrojn, kiuj ekstermas sin en freneza ebrio, dum Heraklo, naŭzite, sed memregante kaj konsciante pri sia homa supero, malproksimiĝas por plenumi la truditan taskon, la mortigon al la Erimanta Apro. Provinte la amikecon, sed perdidita de ĝi, Heraklo lasas sin logiĝi de la malnoblaĵ plezuroj — sed, kiam venas mateno, li rekonsciĝas, kaj altanime reiras al sia laboro, la monstropurigado de la tero. Alta himno al la vireco kaj al la vivstrebo, tiuj lumplenaj paĝoj prezentas al ni plej belan figuron de la homo. Cetere tiu morala konkludo eliĝas el la teksto, sed ne estas pedante klarigita: poemon ni legas, ne predikon; kaj eksterkute gravan kaj densan poemon. Senkomparaj ĉefverkoj estas pecoj, kiel la priskribo de la arbaro, ĉe la komenco: »li ridegis... Kun li ridis la suno brilanta tra la foliaro? Kun li ridis la arbaro. Ĝi jubilis de nevideblaj birdoj, sonoris de skaraboj, brilis en gajverdaj koloroj. Ho, bone konis Heraklo tiun ĉi gajon, li bone sciis, kion ĝi kaŝas. Liaj akraj okuloj ekvidis la kaŝigantajn birdojn, rimarkis sub la arbetoj la estigantojn de la glitsusuraj bruoj, kvankam ilia verdeta, makulita koloro tute fandiĝis kun tiu de l' foliaro. En la tramiksitaĵ sonoraj kaj kriiĉoj, liaj oreloj sciis distingi la voĉon de l' persekutanto kaj de l' persekutato, la vektoron de l' surprizito, la triumfajn aŭ dolorblekajn signifojn. Li sentis per ĉiu fibro, ke la terura, eterna lukto, la kruela

hazarde ankaŭ mi ĉeestis pro ia ofica afero. Pantaleon ekĝojis, min vidante.

»Ho, sinjoro ĝendarmestro, faru vian oficon,« li kriis kaj rakontis al ni sian malfeliĉon, ke li estas elpelita el sia propre konstruita barako.

Ni decidis, ke ni alvokos posttagmeze ambaŭ kulpulojn kaj klopodos aranĝi milde la aferon.

Posttagmeze ni ĉiuj kunvenis. Marja venis en parada vesto kun Mustanoviĉ kaj ekparolis antaŭ ol ŝi estis alparolata, ke Pantaleon minacis ilin per mortigo kaj volis ilin prirabi.

»Pro kio vi ne volis enlasi Pantaleonon en lian barakon?«, demandis la vilaĝestro.

»Ho, sinjoro ĝendarmestro,« turnas sin Marja al mi, »jen la dokumento, ke la barako estas mia, kaj eltiris el sub sia brusto la fatalan paperon.

Kaj en tiu ĉi momento tio okazis.

Marja estis prezentanta al mi la paperon kaj jen! fulmorapide streĉiĝis la mano de Pantaleon. elŝiris la paperon el la mano de Marja kaj metis ĝin en la buŝon kaj ĝin dismaĉis.

»Por ke vi sci, ke mi ne estas tiom stulta,«

ekparolis Pantaleon englutante la dismaĉitan »dokumenton.«

»Li mangiis mian barakon!« ekkriis Marja furioze.

Kion fari? Ni sciis, ke la barako apartenas al Pantaleon, do ni povis nur konsili al Marja, ke ŝi redonu la ŝlosilon al Pantaleon. Mustanoviĉ, vidante, ke la afero progresas malfavore por li, kaj timante pluan demandadon, ĉar li prenis kusenon de Pantaleon, jam pli frue malaperis. Marja devis obei mian konsilon, sed ŝi plendis ĉiam, ke Pantaleon »mangiis sian barakon.«

Tiamaniere savis Pantaleon la barakon kaj de tiu tempo neniam venis al li ideo preni al si virinon.

»La papero havis malbonan guston,« li diradas, »kaj mi ne volas duafoje ĝin mangi.«

La ĝendarmoj eksilentis. Nokta silento regis en la arbaro. Mi rigardis la dehakitan arbaron, brilantan de la morta luna lumo, la stelaron kaj pensis pri homoj, kiuj sin malamas, kverelas, batalas kaj sin mortigas, kvankam ilia vivo estas tiom mallonga kaj post la morto nur kelkaj jaroj sufiĉas por malaperigi eĉ iliajn nomojn. Kaj la suno varmigas kaj vivigas ĉiujn kaj la steloj brilas trankvile kiel anoncantoj de eterneco el aliaj mondoj.

## Mongolaj proverboj

*Unu homo ne estas homo, unu fajrero ne estas fajro.*

*Ne demetu la botojn ne vidante la akvon.*

*Ne ornamu vin per ornamaĵoj, sed per scioj.*

*La plej bona riĉo estas la scio, la meza estas la parencaro, la plej malbona estas la brutaro.*

*Ne diru — la monto estas nepasebla, sed diru — ni pasos, kaj vi pasos.*

*Prefere rompu vian oston ol vian nomon.*

*Ne riproĉu, ke la venena serpento estas malgranda,*

*Rapidu lerni, ĉe se vi mortos morgaŭ matene.*

*La infano, kiu falis mem, ne ploras.*

*Malsukcesa princo havas malsaĝajn subulojn.*

*Formanĝi aŭ ne — la lupo estas ĉiam kulpa.*

*Panon peti de mortinta ruso.*

*La vivo estas kandelflamo en vento.*

*Milmeĵla vojo komenciĝas per unu paŝo.*

*Ne montru la fumon el nastruoj, ĉe se fajrego bruas en via brusto.*

Esperantigis: Junŝebu

amasbuĉo ĉirkaŭ li ne ĉesas ĉe por momento. Li sciis tion, kaj ridegis! Ĉar ĉiu ĉi malhela kaj luktanta vivo estas gaĵo kaj plezuro por tiu, kiu povas ĝin rigardi fortokonscie kaj sen timo... Mi rekomendas ankaŭ al vi la pentron de la orgio en la groto: »Lu centaŭro per ŝaŭmanta vino aspergis la knabinojn. Grandaj ridegoj aŭdiĝis. El la arbaro esploris centaŭrino kun malhelaj kaj jaluzaj okuloj... La sobriĝanta Heraklo mire rigardis siajn terurajn amikojn. En lia animo kirligis terura kaoso. La flava vaporo de l' vino vualis antaŭ li la mondon. La sanga amuzo de l' monstroj, la knabinkorpoj, la centaŭrino, la kolosa muĝo de l' arbaro, noktaj birdoj kaj foraj bestvoĉoj, la malseka alkohola odoro, glataj femuroj, sovaĝaj krioj kaj voluptaj spiregoj en sola, medisigebla maso bolis kaj fermentis en lia cerbo. Kaj ĉio, ĉio, lia tuta mondo, lia tuta esto implikiĝis en tiun ĉi grandan nodon de volupto kaj ebrio kaj naŭzo, kaj ĉio kroma, memoroj, pasintoj, tristoj, malproksimoj: kvazaŭ malaperis, disnebulis en senkorpan songon... Pli saĝaj ol la homo! pensis Heraklo pri la centaŭroj kaj rigardis la potencajn estajojn, kiuj ĉiam obeeme fandiĝis en la grandan ludon de l' estantaro, li sentis, ke ili estas unuj kun la tero, kun la arboj, kun la roko, kun la forto de l' montoj, kiu donas la vinon: kaj en iliaj membroj viviĝis la volupto del' obskura Naturo...«

Tute alia estas la maniero de Dezső Szomory. Per disrompitaj frazoj, ŝajne hazarde fluanta stilo li redonas plej delikatajn nuancojn de la sentoj, li esprimas kun mirinda fideleco ĝuste tiujn konfuzajn animstatojn, kiujn klarigi estus ja detruji. En tiu malluma, meznokta krepusko de l' konscio kuŝas precipe la reĝlando de tiu granda verkisto, kiu, por ni francoj, parenciĝas iom al Goncourt santempe, kiel al Proust: al Goncourt pro la efektoco de lia lingvo, la peno al plej esprimivaj dirmanieroj, al Proust pro la aranea delikato de lia psikologio. La novelo »Ce Mühlhausen la malĝoja oficiro« temas pri kelke eks-terkutima aventuro: nobela junulino fordonas sin nokte, en kampoj, al jam maljuna, malĝoja oficiro, en la unuaj tagoj de la milito. Sed jen ĝuste la arto, tiel subtila, de Szomory: se oni legas tiun leteron de Adrienne Bernay, oni trovas laŭnatura, preskaŭ fatala ŝian geston. Per mil detaloj, per iu »trepidoc« de la stilo, li sciis meti nin

en tian atmosferon, ke ĉio ŝajnas al ni komprenebla, ĉe aprobinda. Tiun sorĉadon al la leganto mi opinias la plej alta grado de la novelarto. Unu el la plej impresaj pecoj, kiu oblikve, sed des pli bone komprenigas al ni la animstaton de la rolulino, estas la nokta vojaĝo de la militvagonaro al la fronto: »nigraj vagonoj, kun la amara pezo, vaporiganta haladzo kaj kunpremiteco de l' homa karno, senfinaj vagonvicoj kun kvazaŭ elŝvelintaj fenestroj kiel la melonaj korboj, kun homaj vinberaroj pendantaj sur la ŝtupoj, ili ekskuiĝis pro la unua radturniĝo, kvazaŭ ili volus vomi el si ĉi tiun kunpremeĝitan liveraĵon. La planko de l' kupejo krakis, la muroj krakis kaj la tuta senfina vagonvico, kun ĝia aglomeriganta feromaso, hurlegis kvazaŭ metala tondrego, kun la stertora muĝego de l' ĉenoj, bufroj, risortoj, bremsoj kaj fenestro-vitroj, kion superkriaciis ektimintaj virinaj voĉoj, kvazaŭ sopranoj de terurita horo super la sonolafo de freneza orkestro... Kaj kiam ni haltis ĉe ĉiu malgranda stacio... la inferaj ferotondroj ripetiĝis denove, la tuta danco, la tuta kaoso, akompanate de novaj sonoj kaj novaj murmuroj, kaj de grincado de l' gardlampoj preter la rel-linioj, kaj de l' pretersiblanta kirlego de la kontraŭvenantaj trajnoj, kaj de l' flugadantaj demandosignoj de l' foraj kaj proksimaj fajfoj, kaj de l' spirego kaj bruliganta vaporeksplodo de l' tro hejtaj lokomotivoj... »Mi ne povas citi la tutan paĝon, sed vere, mi ne konas en mia propra literaturo sampotencan priskribon pri tiu multfoje aludita sceno.

Trian nomon mi signos ankaŭ al la atento de la legantoj, tiun de Zsigmond Móricz (pr. jigmond moric), kvankam ne pro la samaj kaŭzoj. Tie ĉi ni ne plu havas stilrafinon, vortefekton, kaj lingvobrilon, kiel ĉe la antaŭe studitaj verkistoj. Simpla kaj vole neglekta, la lingvo celas nur prezenti al ni la vivon tia, kia ĝi estas, en sia tuta krudeco, stulteco kaj mizero. Kiel Maupassant, Móricz pentras vilaĝanojn, respektante ilian potencan, kvan-



Strambulescu

Kamparanino en ĝardeno

# Vojaĝo en Faremidon

— Frederiko Karinty —

TRIA CAPITRO.

*Kelkaj vortoj al la leganto. / La homo kaj la maŝinoj. / La loĝantoj de Faremido. / La aŭtoron oni komparas al la plantoj.*

La leganto, kiun vojaĝpriskriboj igis ja ankaŭ cetere tro pretendema, eble malkontente kaj senpacience konstatis ĉe la fino de l' antaŭa ĉapitro, ke li apenaŭ konceptis ion el ties esenco, ne komprenante, kio estas tiuj mirindaj maŝinoj kaj surprizaj plantoj, kiujn cetere nur skize mi povis priskribi, parolante pri tiaj fenomenoj, kiujn cetere — laŭ mia scio — neniu vojaĝpriskribanto notis ankoraŭ en sia taglibro.

Humile mi petas la leganton, pripensi, ke, unu parte, kiel simpla kirurgo, kiel mi jam menciis, mi ne estas vortartisto kaj eble mi esprimis min neprofekte kaj aliparte, la fenomenoj, kiujn en la dua ĉapitro mi priskribis, min surprizis tute same kaj ili estis same nekompreneblaj en la unua momento, kiam mi ilin renkontis. Sed mi petas paciencon kaj fidon, modeste aludante miajn kvar antaŭajn vojaĝpriskribojn, en kiuj mi ofte notis nekompreneblajn fenomenojn, kies senco kaj signifo klarigis nur poste, per la sekvajoj. Ĉiokaze donas grandan plifaciligon al la leganto, se li konas miajn kvar antaŭajn vojaĝpriskribojn (pri Liliput, Brobdingnag, Laputa kaj Hauhnhmlando), kiujn Swift Jonathan aranĝis por preso.

Tamen, por plimallongigi mian rakonton, mi anticipas la moralan instruon, kiu poste, dum mia restado en Faremido, maturigis en mi kaj kiun, se la metafizikaj verkoj de l' dudeka jarcento ne estus min koruptintaj kaj infektintaj, jam de longe, antaŭ Faremido, mi estus devinta kompreni, por ne surpriziĝi pri tio, kion mi spertis en ĉi tiu lando.

Estas konstateble, ke, ĉe la unua apero de la homoj sur la tero, ankoraŭ ne estis maŝinoj, ne estis arto kaj scienco. Tiampe ĉio, kion la homoj faris, devenis el natura bezono: ili sin vestis, ĉar estis malvarme, ili fabrikis hakilon por plifacile haki la arbon. Poste venis la sciencoj kaj artoj, kies sola celo, ĉu ne, estis parte helpi la homon en l'aj malfacilaj laboroj,

kam konfuzan individuecon, iliajn profunde fortajn, kvankam malklare esprimitajn sentojn; li starigas sur la fono de l' labortrudanta tero tiujn krudajn brutkonturajn siluetojn, kun tute aparta energio. En la tradukita novelo, »Malriĉaj homoj«, aldonigas al tiuj karakteroj la priskribo pri la malordego, kiun povas meti en la primitivan ĉerbon de kampulo tiel haose monstra evento, kiel la milito. Dum libertempo, la soldato konstatas la mizeron de sia familio, kaj, pelita de apenaŭ konsciataj fortoj, uzas por liberigi ĝin la tutan scion, kion li akiris ĉe la fronto: ŝtelon kaj murdon. Sed tiu krimulo ne ĉesas esti iurilate homo; li buĉis infanetojn, sed uzas parton de la ŝtelita mono por aĉeti mielkukojn por la siaj. Koncize terura akuzado al la milito! Tiu peco, per la larĝaj kaj dikaj peniktuŝoj, per la kruda brilo de l' farboj estas unu el la plej drastaj pentraĵoj, kiujn mi legis ĝis nun.

Ceterajn prozistojn mi ne volas tie ĉi pli detale studi, ĉar, kvankam interesaj, ili ne atingas la staturon de tiuj tri. Cetere tio ne pruvas ke ne ekzistas en la hungara lingvo, aliaj samvaloraj pecoj. Kalocsay en la enkonduko, avertis nin ke li »volis doni ne tiom dokumenton pri la hungara literaturo, kion interesan kaj plezure legeblan legaĵon«. Kaj se en la franca publiko plimulto preferas P. Benoit al A. Gide, des pli kom-

kaj parte kompletigi niajn ideojn kaj imagojn, kiujn ni formis pri la sensitaj fenomenoj. Por levi la pezajn objektojn oni eltrovis la pulion, por pli preciza kaj pli ekzakta ekkono de la viditaj fenomenoj oni inventis la desegnon kaj la skribon.

Kompreneble post jarcentoj ĉiam pli kaj pli perfektigis la scienco kaj la arto: grandiozaj maŝinoj helpis la homon en lia laboro, multobligante ĉiun eblon, kaj ĉiam pli kaj pli perfektaj statuoj, pentraĵoj, poetaj verkoj fiksitis kaj prezentis la hasteme sensitajn tempajn kaj spacajn fenomenojn en ilia plena signifo.

Fine ni atingis, ke la maŝinoj ne nur helpis la homon en ĉiu lia laboro kaj multobligis lian forton, sed ankaŭ ili solaj multe pli perfekte plenumis la laboron, ol nia fortmanka homa korpo ĝin iam povis plenumi. Tiel ankaŭ la artoj: pentraĵoj, statuoj, verkoj, komponaĵoj esprimis kun tia perfekte la simptomojn de l' vivo, la formon, la koloron, la eventon, la senton, ke la reala vivo malproksime postrestis al ili pri invento, belo kaj esprimforto.

Kio sekvis el tio? Maŝinoj kaj verkoj superis la homon: ili fariĝis pli perfektaj; kaj baldaŭ ni atingis, ke, se la homo volis esti perfekta, li devis imiti la maŝinojn kaj verkojn, kiuj iam imitis la homon. Je la evoluo de nia karaktero pleje efikis nia kulturo, romanoj, dramoj, verkoj. Niajn formojn difinis la arto. Iam, promenante en Budapeŝto, mi vidis sukervendejon, kiu sin nomis »aŭtomato«, supre oni enĵetis groŝon, kaj post tio sukeraĵo elvenis tra aperturo. Interne de ĉi tiu aŭtomato sidis homo, la mono falis en lian manon kaj li elŝovis la sukeron tra l' aperturo. Ĉi tiu homo senkonscie rekonis, ke la homoj pli multe fidis al maŝinoj, ol unu al la alia kaj li volis kredigi per ruza artifiko, ke li estas maŝino.

La homoj atingis, ke ili jam donis dekmiloble pli multe por pentraĵo prezentanta nudan virinon, ol por la virino, kiu servis modele al la pentristo; oni ne donis al la homo la respekton, kiun ricevas lia imitita, rekonstruita kopio. Mi rememoras, kia sincera indigno vekigis en mi, nelonge antaŭ mia vojaĝo al Fa-

preneble ĉe la esperanta iu Ferenc Molnár aŭ Endre Nagy vekos pli da intereso al Babits aŭ Szomory.

Mi ĝis nun ne parolis pri la tradukintoj: Bodo, Halka, Szilágyi kaj Totsche. Ili ĉiuj rimarkinde sukcesis en sia, ofte subtila kaj delikata, tasko. Sed du precipe indas atenton kaj admiron, Bodó kaj Totsche. Ni jam konis ilin per aliaj verkoj; sed tie ili, ne nur prenis sur sin la plejparton de l' laboro sed ili ankaŭ alfrontis malfacilegajn, krutajn verkojn: kaj oni povis juĝi, laŭ la pecoj kiujn mi citis el »Mitologio« (Totsche) kaj »Ĉe Mühlhausen« (Bodó), kun sia majstreco, per kia arto ili venkis la malhelpojn. Neniam oni sentas ilin penaĉi super fremda teksto; ĉio fluas rekte, larĝe senbare — kun la potenca kvieto de bela rivero. Apud la servo farita de ili al sia hejma literaturo, ni devas danki ilin pro tiu — netaksebla — kiun ili faris al nia lingvo.

Unu rimarkon, ĉe la fino. J. Baghy ne tradukis eĉ unu paĝon el la proza parto, kaj en la poezia oni trovas de li nur malgrandan, 35-versan poemon. Ŝajnas, ke li tute ne ŝatas prunti al aliaj aŭtoroj siajn esperantajn kapablojn, kaj konsentas esprimi per nia lingvo nur siajn proprajn ideojn: jen eble kial li ne sentas ĝian vortmalriĉon.



## Nokta kanto

— Hendrik Adamson —

*Folisusur',*

*fontet-murmur',*

*jen ĉielrando en purpur'.*

*El post kurtenet' flirtanta*

*lunetadas nokt-kandel'*

*kaj la mondon tramigrante*

*gardo-staras dorm-anĝel'.*

*Folisusur',*

*fontet-murmur',*

*jen ĉielrando en purpur'.*

*En brilante blanka robo*

*baldaŭ venos la maten',*

*sur la ŝultro kun sunglobo;*

*disrompiĝos nokt-katen'.*

*Folisusur',*

*fontet-murmur',*

*jen ĉielrando en purpur'.*

remido, kiam la barbaraj germanoj ekbombardis la katedralon en Reims, sed samtempe mi nur surface rimarkis, kiom da viktimoj estis oferitaj en ĉi tiu batao. Sed ja ĉiuj ni scias ankaŭ tion, kiom pli multe gravis, kiom pli grandan entuziasmon vekis la famo, keni kaptis unu-du ŝipojn aŭ kvin-ses kanonojn de l' malamikoj, ol tio, ke ni sukcesis mortigi el ili kvin-ses mil homojn; kvin kanonoj egalvaloras por ni kvinmil homojn kaj estas same granda perdo ankaŭ por ili. Se mi estus jam tiutempe sobre pensinta pri tio, mi ne estus devinta tiom lerni en Faremido per mia propra malutilo. Mi estus kompreninta, ke la homo ĉiam pli altetaksis, kion li kreis, ol sin mem, kaj en ĉiu sia kreaĵo li penis krei ankaŭ sin mem, krei nova kaj pli perfekta, por ke poste li mem ĉesu ekzisti, kiel superflua argilmodelo, en kiun oni fandis la metalon. Mi estus jam devinta tion kompreni, kiam oni inventis la kinon kaj mi vidis, kiom pli volonte oni vizitis la kino-teatrojn, kie oni vidis nur la surmure projektitajn bildojn de la sama aktoro, kiun ili estus povintaj vidi, por la sama sumo, ankaŭ en sia viva realo sur la eksmoda teatra scenejo. Vere ope kaj aparte, en detaloj kaj en tuto, la homo, jam de l' komencaj tempoj, volis modeli pli perfektan estajon pri si mem: por tio servis la mikroskopo kaj la teleskopo, la fotografmaŝino kaj la Röntgen-radio, la aŭtomobilo kaj la aeroplano.

Mi diras, se ĉion ĉi mi estus sobre pripensinta kaj kompreninta: mi estus povinta veki en la loĝantoj de Faremido pli grandan respekton kaj estimon por mia arde amata patrujo. Ili estus rekonintaj, ke la miro, kiu min preskaŭ narkotis, kiam ĉe la fino de la arbara vojo disvolviĝis antaŭ mi tiu brila konstruaĵo, ke jam ĉi tiu miro mem pruvis: ke malgraŭ mia homa malperfekteco tamen mi estis inda vivi inter ili kaj eble iam iĝi simila al ili. Sed mi, antaŭokupite kaj stulte, longtempe insistis pri la supozo, ke tian kreaĵon povas produkti nur homa mano.

Mi staris tie kaj ĉirkaŭrigardadis kapturte: tiam unu el la maŝinoj, starantaj antaŭ la halo, moviĝis kaj kun facilmovaj saltetoj proksimiĝis al mi. Mi rekonis

la maŝinon, kiu min portis ĉi tien kaj min lasis sola sur la transa bordo de l' rivero. Ĝi aŭdigis la saman muzikan takton. Ankaŭ kelkaj el la ceteraj maŝinoj moviĝis kaj venis tien. Ili min ĉirkaŭstaris kaj ĉirkaŭ mi eksonis efektiva koncerto, la maŝinoj muzikis. Mi ĵom ektimis, ĉar mi nenie vidis homon el karno kaj sango, samtempe ankaŭ la naturo komencis postuli siajn rajtojn, mi sentis malsaton kaj lacon. En la espero, ke mi eble tamen povos min komprenigi, mi ekparolis diverslingve, rekomendinte min en ilian indulgon kaj komprenon. Sed, ĉar ĉiam respondis nur muzikaj sonoj, mi refoje ekatentis kaj distinginte inter la sonoj kelkajn plurfoje ripetigitajn taktojn, mi imitis tiujn antaŭ ili. Tiam, kvazaŭ surprize, fariĝis silento, poste ili etendadis siajn metalbrakojn unu al la alia, ili ŝajnis fari kunsidon. Tiam ĉirkaŭrigardante mi rimarkis, ke ili ne ĉiuj estas unuformaj: estis inter ili flugilaj kaj senflugilaj, kvadrataj kaj rondformaj, el diverskoloraj metaloj; sed ili tute similis laŭ sinteno kaj ankaŭ laŭ tio, ke ĉiu estis komplikita kaj senfine delikata kaj preciza mekanismo.

Dum mi meditis pri tio, metalbrako sin etendis al mi kaj levis min en la aeron, mi ekvidis grandegan vitrolenson, kiun io tenis super mia kapo, kaj post la vitrolenso, radiante kaj atente, kvazaŭ grandega okulo brilis malsupren al mi. La brako, kiu min levis, malrapide movis kaj ŝovis mian kapon, mi havis la malagrablan senton, ke oni min observas, kiel la insektisto ian strangan vermon sub la lupeo. Poste ree oni min delasis kaj metis sur la teron. Poste la flugila maŝino, kiu min alportis, prenis mian manon kaj ko-



Grigorescu

Printempo

# La flugmaŝino

— Kristman Gudmundson —

Tio okazis dum la tempo de fojnokolekto, meze de silenta somera tago en la malgranda Laxadalen, interne de Islando. La viroj el Dal kolektis la fojnon kaj metis ĝin diligente en garbon. Dum la antaŭa semajno multe pluvis kaj la akvo multe difektis la fojnon. Nun oni devis eluzi ĉiun horon, dum la vetero estas favora. Eĉ la maljuna Thoroddina, la patrino de la mastro Havardur, la maljuna avinjo, trenis sin sur la kampon, malgraŭ sia podagro. Si jam estis blinda de multaj jaroj kaj en la maljunaĝo ŝi fariĝis kaprice tedema. Sed ŝi volis ĉeesti ankoraŭfoje tiun mondon, kiu estis la ŝia dum longa tempo: la mastrumon kaj la kamplaboron. Si mem ja ne povis jam multe fari kaj la nova generacio, kreskinta en la familio ne multe zorgis pri ŝi. Novaj tempoj estis la nunaj, kun frenezaj aĵoj ensorĉintaj la homojn! Eĉ la knabo, kiel ŝi nomis ankoraŭ ĉiam la mastron Havardur, kvankam tiu jam estis trans la sesdeko, kreskis super ŝian volon. Vidu, li pasintjare malkonstruis la malnovajn varmajn torf-dometojn kaj konstruigis el ligno kaj fero kelkajn domojn impertinente karajn kaj grandajn. La maljunulino faris ĉion eblan por tion malhelpi, ĉar, se tio ne estas freneza ago, ŝi vere ne scias kiel ĝin nomi. Ja oni eĉ ne povas logi en ili, tiel grandaj kaj vastaj estaj tiuj domoj! En ili eĉ tiu ne povas ĝuste trovi la lokojn, kiu vidas bone, kaj kion faru blindulo?

Vere estis granda bezono je iu pli maljuna kaj pli sperta por ke li kuntenu ĉion — nuntempe, kiam ĉiu rapidege kuras fruntantaŭe al la mizero kaj ruiniĝo. Nekredebla kaj fabela estis ĉio, kion oni rakontis pri la mondo, eĉ pri tiu ĉi malgranda valo mem. Si ne demandadis multe, sed ŝi povis bone imagi, kien kondukas ĉio ĉi. La mondo proksimiĝas al perejo, baldaŭ alvenos la lasta juĝo. Estis amare scii pri tio, precipe por homo, kiu vivis ankoraŭ en la malnova, trankvila bona mondo, kiam la homoj laboris pli multe kaj la grundo povis resti, kia la Disinjoro ĝin kreis. Nun ĉio staras kapaltere. Oni fosaĉas la teron per ia eksterlanda aparato kaj volas al ŝi kredigi, ke pro tio estos pli bona la grenproduktado! Tion ja oni povas diri nur al ŝi, al nevidanto. Kaj ne la unuan fojon oni volas ŝin trompi. Ankaŭ tio ĉi estas tia novspeca aĉaĵo, pri kio oni ne povas distingi, kiom estas en ĝi la mensogo kaj kiom la vero. Ĉiuloke estas la sama sinpelado, rapidado kaj neniu estas konfidebla. La homoj ne estimas plu la malnovajn morojn. Eĉ la irado de la

vetero estas pli forta kaj ŝanĝema, ankaŭ la suno ne brilas tiel varme, kiel antaŭe.

— Ĉu vi ne forgesis rigardi la plankon de la fojnostalo, Havardur? — kriaĉis ŝi subite, ĉar ŝi ekmemoris, ke ĝia grundo estis tre malseka pasintaŭtune.

— Certe ne, patrino — respondis la mastro. Ankoraŭ li ne hardis sufiĉe sian koron por rakonti, ke la malnovan garbejon oni malkonstruis kaj starigis sur ĝia loko modernan grenejon. Ja la patrino certe ne komprenos tion. Vere, ankaŭ li mem ne ĉiam, sed tion volis la filo, Thorodden, ĉar la tempoj tiel deziras — li diris. Havardur membrestreĉis, viŝis per la ĉemizmaniko la ŝvitantan frunton kaj observis iom da tempo la patrinnon. Si sidis sur monteto, kuŝigis siajn kalajn manojn en la sino kaj turnis la kapon al la suno. Ŝiaj maldensaj blankaj hartufoj taŭzigis, la ŝrumpiĝinta vizaĝhaŭto estis bluece flava, kaj la lipo lokiĝis sub ŝia akre kurbigita nazo kvazaŭ kurba linio. Ŝiaj vestoj estis jam nuraj ĉifonoj. Vane oni klopodis persvadi ŝin, ke ŝi surmetu pli bonajn vestojn, ŝi obstine insistis, ke en Dal oni kutimas bone eluzi la vestaĵojn. Sed sur ŝia vizaĝo ankoraŭ montriĝis volo kaj decidemo. Estis rimarkeble, ke li tenas siajn okulojn sur la laboro.

Ankaŭ Havardur estis jam maljuna kaj forte grizigis. Sed estas ja sufiĉe da novaj fortoj ĉirkaŭ li, por deĵori anstataŭ li. Estis agrable por li tririgardi la tutan grupon: li havis tri fortike virecajn filojn kaj sep nepojn. Ankaŭ la farmo ne restis la lasta el tiuj en la proksimo. Modele oni kulturis ĝin per modernaj laboriloj kaj maŝinoj. Estis ja hodiaŭ alie, ol en la tempo de la avo, kiam du tagojn daŭris por unu homo pioĉi la grundon por terpomo. Tamen tiutempe estis tre bela la vivo kaj ankaŭ al li ne plaĉas ĉiam la multaj novaĵoj.

Mirinda tondro de malproksima neĝlavango interrompis lian revadon. Mire, kio do povas esti tio? En la unua momento li preskaŭ ektimis. Ankoraŭ neniam li aŭdis tian bruon. Nun ankaŭ la aliaj rimarkis ĝin. Unu post la alia ili delasis la laboron, membrestreĉis, aŭskultadis kaj rigardadis en ĉiun direkton. Estis aŭdeble, ke la bruo konstante proksimiĝas, sed de kie do? Fine la malgranda Havarduro, la nepo de la maljuna, rimarkis nigran punkteton super la sudaj montoj. Ĝi similis al birdo kaj ju pli proksime aŭdiĝis la stranga bruo, des pli granda vidiĝis la punkto. Kaj nun Thor-

mencis min konduki; estis io simila, kiel la patro instruas iri la etan knabon: la maŝino paŝadis apud mi malrapide, atente; kie la vojo estis pli malglata, tie ĝi levadis siajn radojn, sur loko pli glata ĝi ruliĝis malrapide, singarde. Dume ĝi ofte turnis al mi sian oran metalkapon kaj el la brilaj okuloj al mi fluis blueta lumo, poste ĝi ekkantis kaj nun mi jam sentis certe, ke per ĉi tiuj voĉoj ĝi parolas al mi kaj ke en ĉi tiu lando oni parolas tiamaniere, per muzikaj sonoj, la vortoj kunmetiĝas el muzikaj sonoj. Kompreninte tion, mi klopodis al li komprenigi, ke mi volus lerni ĉi tiun lingvon; montrante al la palaco mi mansignis, ke mi deziras scii, kiel ĝi nomiĝas. Ĝi tuj komprenis, kion mi deziras, ĝi donis kelkajn sonojn: mi, fa, re, kiujn mi tuj ripetis. Videble ĝi ekĝojis kaj nun jam ĝi mem komencis montri la objektojn, prezentante ĉies

nomon, kaj mi ripetis la sonojn. Ĝi montris al si mem kaj kantis: so-la-si. Poste ĝi signis per larĝa gesto la tutan horizonton kaj muzikis jene: fa, re, mi, do, kion mi jam aŭdis, kiam ĝi min portis ĉi tien. Tiam mi eksciis, ke la nomo de la lando estas: Faremido. (Mi petas la leganton, prononci la originalajn vortojn ĉiam nur kante, ĉar nur tiel ili havas sencon.)

Fine ni venis al la aleo, kiun mi ĵus trairis jam inter la homformajn arbojn. Mia gvidanto ekstaris apud tia arbo, delikate kaptis min ĉe mia kokso kaj starigis min apud la arbon, poste, iom repaŝinte ĝi levis sian metalbrakon super sian kapon: mi vidis, ke ĝi min observas kaj komparas. Ree min kaptis tiu malagrabra sento: nun estis, kvazaŭ botanikisto komparas du plantojn por konstati la parencecon. (Daŭrigota) El la hungara: *L. Totsche*.

## Epitafo

— R. L. Stevenson —

*Sub larĝa stela la ĉiel'  
Lasu min en tombo-ĉel';  
Ĝoje mi vivis, ĝoje el  
La viro pasis mi nun.*

*Por mi la epitafo jen:  
Tie kuŝas li sen ĉagren';  
Venis maristo re al haven'.  
Kaj ĉasinto re de la dun'.*

El la angla: Brian Price-Heywood.

oddur, la plej maljuna filo de la mastro, kiu jam estis ankaŭ en fremdaj landoj, eldiris la liberigan vorton:

— Flugmaŝino!

La patro iom konsterniĝis. Ĉu flugmaŝino? Li sciis, kion tio signifas, aŭdis kaj legis jam pri tiuj strangaj ŝipoj, naĝantaj en la aero. Streĉin'e la palpebrojn, gape li rigardis, lin kaptis pia emocio, kiel en la preĝejo.

— Kio frapas tiom brue, Havardur? — demandis la maljuna Thoroddina per voĉo, parte minaca, parte malfida. Ŝi starigis sin pene kaj lametis al la aliaj, kiuj ariĝis senvole en grupeton.

— Kio estas, mi volas scii! — ŝi diris kaj kvazaŭ ploro sufokis ŝian gorgon. Poste tuj ŝi daŭrigis akre:

— Nu ĉu vi ne povas respondi, ĉu ĉiuj vi falis sur la buŝojn?

— Flugmaŝino, avino — diris Thoroddur.

— Kia maŝino? — grumbladis la maljunulino. Ŝi ja aŭdis jam pri maŝinoj, sed ŝi povis imagi nur kudromaŝinon kaj plugmaŝinon. Sed ŝi ankoraŭ neniam aŭdis ke la plugmaŝino faras tian teruran bruon. Tiu abomena krakado embarasis ŝin kaj ŝokis ŝian maljunan cerbon. Kia nova frenezaĵo estas tio? Eble ĝi konsumos eĉ la tutan riĉaĵon de la familio! Ŝi aŭdis kvazaŭ la maŝino siblus ĝuste super ŝia kapo. Ĉu estas eble, ke la »knabo« aĉetis ĝin plej laste, kiam li rajdis al la urbo? La knabo ce'ere ĉiam rakontis, kion li alportis de la komercistoj, kondiĉe, ke li fakte diris la veron. Jes, Jam delonge ŝi suspektas, ke li ne estas honesta al ŝi, ankaŭ lin koruptis la novaj tempoj, kiel la aliajn.

— Kio tio, Havardur? — ŝi pepis. Nun jam bone oni povis aŭdi la ploretan de la maljuna, rustiĝinta voĉo.

La flugmaŝino nun ĝuste atingis la valon kaj flugis tiom malalte, ke oni povis vidi ĝian formon tute precize.

— Certe ĝi estas la unua flugo de la nove establita pasaĝermaŝino tra Islando — deklaris Thoroddur kaj elkraĉis. La aliaj tiam emociiĝis, ke ili ne kapablis ion krom gapi. Neniu atentis la maljunan Thoroddina, kiu lamentante demandis, turnan'te s'an vizaĝon al la terura bruon.

La miraklo malaperis malantaŭ la nordaj montoj kaj denove silento kovris la valon. Nur tiam oni komencis klarigi al ŝi la aferon. Unue Thoroddur, ŝia nepo, komencis klarigi, sed ŝi interrompis lin, ĉar estis multe pli infaneca, kion li diris, ol ke maturuloj povu senutile malŝpari sian tempon por lin aŭskulti. Ŝi diris al li tion kaj turnis sin al la filo:

— Kio do estis tio, Havardur? —

— Vidu do patrino, — komencis la filo. Li ne

rericevis ankoraŭ sian animan ekvilibron, li sentis, kvazaŭ li revenus de entombigo, tiom solenaj estis la travivitaj momentoj.

— Vidu nur, patrino — li daŭrigis — ĝi estis tia ŝipospeca, kiu povas veli en la aero.

— Tia ŝipo, kiu povas veli en la aero — ripetis la maljunulino malfaute, sen akcento, dum ŝiaj blindaj okuloj avide volis esplori la malproksimon. Unu solan fojon dum sia tuta vivo ŝi vidis ŝipon kun altaj mastoj, blankaj veloj. Iom poste ŝi aŭdis pri ŝipoj, kiujn movas maŝinoj en tempesto, ventego. Sed ŝipon, kiu povas veli en la aero? Anime ŝi vidis la dumastulon kun streĉitaj veloj. Kaj tiu flugas tra la valo, ĝuste super iliaj kapoj? Kaj kio kaŭzas tiun teruran bruon? Tion ja ĉiu devas rigardi nur intencita trompa mensogo, ĉiu, kies spiritostato restis pli-malpli en ordo!

Ŝi paŝetis en sian kameron, palpiris al sia lito, demetis la vestoĉifonojn. Jes. Nun ŝi ekkuŝos. Kaj ŝi ekkuŝos nun decide. Ŝi rekonas, ke ŝi nenion plu havas por serĉi en tiu ĉi mondo...

Tradukis: E. W. B.

## Soneto

— Platen —

*Mi volus en la morto, kiel la brila klaro  
De l' steloj, subitege kaj sen konsci' ekpali.  
Mi volus sub la frapo de l' morto foje feli,  
Kiel antikvaj m'toj rakontas pri Pindaro.*

*Ho, mi ja ne deziras en kanto, vivo, farno,  
Tiun nerival'eblan Grandulon ekriveri.  
Mi volus, ho amiko, lin nur en mort' egali —  
Sed aŭdu pri l' rakonto belega sen komparo:*

*Li sidis en teatro kaj kanton li admiris,  
Kaj sian lacan kapon li metis kun beato  
Ripoze sur la belan genuon de l' amato.*

*Kaj kiam la kontado de l' hor' jam laste spiris,  
Lin volis milde vekti la kara kamarado.  
Sed la poet' jam glorie al Dioj hejmeniris.*

El la germana: L. Totsche

## La belo

— Baudelaire —

*Ho mortemul', mi belas kiel marmorvizio.  
Kaj mia sino, kies mortigas frida flamo.  
Estiĝis por inspiri la poetojn al amo  
Eterna kaj si'enta kiel la materio.*

*Kiel enigma sfinkso en la lazur' mi tronas.  
Kunigas koron neĝan kun la blanĉec' de cigno.  
Linio-rompan movon ma'amas mia digno,  
Nek larmo de mi gutas, nek rido de mi sonas.*

*Poetoj, antaŭ mia majesta poz' kvietaj.  
Pruntita de la pleje fieraj monumentoj.  
Konsumas siajn tagojn en longa stud' asketa.*

*Ĉar havas mi, por ravi amantajn ĉi studentojn,  
Spegulojn, kiuj faras la aĵojn pure belaj:  
Li okulojn, miajn grandajn okulojn eternhelajn.*

El la franca: L. Totsche

# Horaĉo Serĉer faras revolucion

— I. Lejzerowicz —

Horaĉon Serĉer mi ne vidis jam dum multaj monatoj. Li malaperis kiel ŝtono en la akvo. Mi estis jam grave maltrankvila pro li. Ne miru: Serĉer, kiel vi scias, estas ja impulsiva karaktero, kaj Dio scias, kian aventuron li ie havis kaj kio kun li fariĝis?! Sed fine antaŭ kelkaj tagoj mi trovis lin. Li sidis, kiel kutime, en parko, dronante en siaj profundaj pensoj.

— Kie vi estis, kara Horaĉo, dum tiel longa tempo?

— Prefere ne demandu. Mi ne respondos al vi.

— Kial?

— Mi estis en eksterlando. Kaj eksterlando havas ĉiam ion komunan kun politiko. Kaj pri politiko honestaj esperantistoj ne parolas. Oni min kondamnos ke mi faras »terurpropagandon«.

— Kaj kion vi faris en eksterlando?

— Mi tie studas la metodon, kiel fari revolucion. Vi scias ja, ke mi preparas renverson en nia movado.

— Serĉer, vi ŝercas?

— Ne, mi nur serĉas. Mi serĉas la vojon, kiel fine sanigi nian movadon. Gangreno ĝin konsumas. La internaj malpacoj disŝiras ĝin...

Kaj energie eksaltinte de sia loko, li etendis sian dekstran manon kaj poze, emfaze ekkriis:

— Mi savos nian movadon! Mi sanigos ĝin! Mi faros ordon! Disciplino estas necesa, ĉu vi komprenas? Diktatoron ni bezonas en nia movado! For la enuigan tedan malutilan idealismon! La nuna tempo postulas fortan pugnon! Ni devas fari revolucion!

Mi time paliĝis de tiuj vortoj kaj angore ekrigardis en la okulojn de Serĉer. Ili flame fascinis kaj ŝprucis kolerajn fajrerojn. »Trankviliĝu, kara Horaĉo«, mi diris al li.

— Ni devas frakasi tiun butermolan aferon! — li abrupte interrompis, ni devas fari revolucion!

— Bone! Bone! — mi komencis kvietigi lin — ni faros la revolucion, sed trankviliĝu antaŭe. Tia iritiĝo povas ja tre malutili vin. Sidigu kaj klarigu al mi detale, kion vi pensas kaj celas?

Li sidigis, forte profunde ekspiris, kaj post kelk-momenta silento li ekparolis.

— Rasa pureco! Rasa ĉasteco! Tio estas la plej alta idealo, tio estas la plej fidinda garantio pri sukceso. Elŝiri la malutilajn urtikojn kaj herbaĉojn, venenautajn nian movadon! La verdeco de nia raso devas esti flegata tutplene. Senkomparte forigi ĉiujn, kiuj enportas fremdajn elementojn en nian movadon. Iu enkondukas novan vorton? Enkarcerigi lin! Iu uzas la »io«-sufikson? Eljeti lin el la movado! Iu batalas por nova, demokratia parlamenta organizo? Mortigi lin, al diablo, kiel hundon mortigi lin! Demokratecon ili volas, parlamentecon ili deziras, tiuj knabaĉoj!? Disciplinon ili tenu, senhontaj arogantoj!

— Kion vi parolas Serĉer? — mi interrompis.

— Ne malhelpu! Vi ankaŭ ne estas purrasa verdulo! Vi infektas aliajn, ni izolos vin, ni enkarcerigos vin! Mi scias: vi ĉiam penis detruie influi en nian movado, vi ĉiam ekscitis kontraŭ ordo kaj disciplino! Sed ni trovos rimedon kontraŭ vi. Aŭskultu kian programon mi proponas:

Ano de la Esperanto-movado povas esti ĉiu purrasa eseprantisto. »Purrasa« signifas, ke li deklaras disciplinitan obeon al la ĉefaj instancoj de la movado.

Kiu pensas kaj kritikas, ne estas esperantisto, kaj lin ni internigos en speciala tendaro.

Por levi la kulturenivelon de la movado kaj por riĉigi nian »purrasan« literaturon, la ĉefaj instancoj zorgos pri plej konvena legmaterialo, ekz.: poŝtmarkoj de Lihtenŝtejno, turistaj prospektoj, Ĉefeĉ-slosiloj, Sherer-raportoj k. a.

Pri la Universalaj Kongresoj estas starigitaj la jenaj rajtoj: aĉeti la kongreskarton, viziti la urbon, kanti la himnon, akcepti la raportojn, partopreni la Internacian Balon kaj la komunan fotografadon.

Estas malpermesite al vi: proponi iun ajn ŝanĝon (mia propono), konfesi kiu vi estas kaj paroli pri viaj konvinkoj (propono de Karl Minor en Heroldo), oserdi dum la laborkunsidoj (mia propono) — kaj ĝenerale estas malpermesite fari ion ajn sen antaŭa permeso de la koncerna instanco.

La plej brila programero de la Universalaj Kongresoj devas esti la pompaj aŭtodaŭoj de ĉiuj esperanto-libroj, kies enhavo ne plaĉas al ni. Kompreneble antaŭ ĉio pereos en flamoj la libroj de Zamenhof, ĉar li kuragiis esprimi la supozon, ke eble, eble, post longa tempo Esperanto evoluos ĝis nereconebleco. Li do ne estis purrasa esperantisto. Imagu, kara amiko, kiel belega spektaklo ĝi estos! Ni metos grandegan brulŝtiparon sur la urba placo, sur la ŝtiparon ni verŝos peĉon, la »purrasaj« verduloj dancos ĉirkaŭ la fajro, kiel indianoj, kaj komenciĝos la ceremonio:

Hans Jacob je'os libron en la fajron kaj diros:



Grigorescu

Kampanarino

## Pluaj rondeloj

— Mevo —

Kaj kie nun TOSCHI sin kaŝas?  
Li estis reganta risorto.  
Verŝajne tirana perforto  
detene — ret.en e lin maŝas...

Ni timis ke certe minacas  
ita'an movadon la morto  
de kiam — ve! — TOSCHI sin kaŝas,  
la vera reganta risorto.

La verdan riko!ton ni draŝas:  
ĝin daŭre florigis la sorto;  
sed kurbe, sopire, sen vorto,  
hezite, dubeme ni paŝas...  
Ho, kie nun TOSCHI sin kaŝas?

MONTEZEMOLO, la Gvidanto,  
la forta, saĝa Generalo,  
komandas al ĉiu italo,  
laboranta por Esperanto.

Vetas kun Tempo — konsumanto,  
lverko hardita kiel ŝtalo,  
MONTEZEMOLO, la Gvidanto,  
la fida, bona Generalo.

Fiera, brava komandanto  
de kanontrupoj dum batalo,  
por nia lingva idealo  
nun estas Flago kaj Reganto

MONTEZEMOLO, la Gvidanto.

mi solene bruligas la raportojn de Robert Kreuz.

Robert Kreuz jetos libron en la fajron kaj diros:  
pereu la raporto de Hans Jacob. Vivu la verda raso!

Julio Baghy jetos pakojn da libroj en la fajron  
kaj patose deklamos: Hajl' al vi, Kalocsay! Hajl' al  
vi, tempest al vi, fajr' al vi, Kalocsay!

Kalocsay »sinkigos« kelkajn volumojn en la  
»incendion« kaj jubilos: Baghy flamas! Fine mi  
venkis!

Jung faligos en la flamojn sakon da libroj,  
etodos la manon kaj jubilos: Bleier verrecke! Vivu  
la verda raso!

Bleier jetos kelkajn librojn sur la ŝtiparon kaj  
krios: Jung brulas! La estonto estas mia!

— Mi pensas, ke estas jam sufiĉe da fajro —  
mi interrompis — indulgu almenaŭ la tradukitan de  
mi »Sorĉistinon el Kastilio«, kiu mem estas plena de  
gehena fajro...

— Ne sufiĉas, ne sufiĉas! — retondris Horaĉo  
Serĉer, enirinta en la »trancon« — la revolucio devas  
esti ĝis la lasta detalo efektivigita! Ni devas savi la  
movadon! Ni devas purigi, refreŝigi ĝin! Venis la  
tempo por heroaj agoj!...

Senforte li refalis sur la bienkon. Liaj okuloj  
elstariĝis, angora ŝvito kovris lian frunton. Kaj subite  
li komencis plori kiel infano. »Trankviliĝu — mi  
diris — tia ekscitiĝo ma'ut'ilas vian sanon, gardu vin«.

— Promesu al mi, kara amiko — li plore sing-  
ultis — ke vi rase purigos kaj helpos min fari la  
revolucion. Ĝi ja estas tiom necesa, benoriĉa por nia

movado. Se ni ne ekagos, nia afero pereos. Ordo devas  
regi, disciplino estas necesega. Ni elŝiros la herbaĉojn,  
kiuj venenas nian movadon, kun la radikoj. Ni enkar-  
cerigos la opoziciulojn, ni bruligos la librojn. Vidu,  
tio estas la plej sukcesa metodo en la nuna tempo. La  
pugno oni timas. Kial ni ne apliku ĝin?

Ankoraŭ iaajn vortojn li balbutis, sed ilin mi ne  
komprenis jam. Tute eĉerpita de la emocio, kiun ĉiam  
donas al li la propraj paroloj kaj ideoj, Horaĉo Serĉer  
forte ekdormis.

Kaj deĵorante ĉe li sur la benko, mi pensis:  
Horaĉo Serĉer volas fari revolucion, gardu vin esper-  
antistoj! Kaj eble li pravus iom: eble utilis ne unu  
verdulon enkarcerigi, kaj ne unu libron bruligi por  
purigi nian movadon kaj literaturon de malbonaj  
herbaĉoj...

## LINGVO

PRI LA PREFIKSO MAL.

Sro Sentis en siaj lingvaj ediktoj kondamnas la  
vortojn *malcerta* kaj *malĝusta*, ĉar laŭ li *certa* kaj *ĝusta*  
ne havas kontraŭojn, oni do devus diri *necerta*, *neĝusta*.  
Li kondamnas ankaŭ la vorton *malhavi*, ĉar laŭ li oni  
povas ion havi aŭ ne havi, sed malhavi oni ne povas. La  
saman opinion havas ankaŭ sro Th. B. (Laborista Esper-  
antisto 1933, pĝ 94.); laŭ li la vorto *malhavi* estas sen-  
senca, eĉ kontraŭa al la spirito de Esperanto.

Okaze de ĉiuj ĉi opinioj, mi deziras ion pritrakti  
la funkcion de la prefikso *mal*.

*Mal* signas kontraŭecon. Certe. Sed ĉi tiu kontraŭ-  
eco estas duspeca, se oni ĝin esploras laŭ ĝia rilato al la  
nea formo. Ĉe verboj, ĝi plej ofte ne estas samsignifa al  
la nea formo, ĉar ĉi lasta signifas simplan *negativecon*  
(ne-agon), dum la mal-formo signifas *pozitivecon* kontraŭ-  
econ (malan agon). *Ne utili* signifas fari *nenion* (nek  
utilon nek malutilon), dum *malutili* signifas fari ion  
(malutilon). Same ĉe *ne laŭdi* kaj *mallaŭdi*, *ne kovri*  
kaj *malkovri*, *ne ŝlusi* kaj *malŝlusi* ktp.

Ĉe adjektivoj, kontraŭe, ambaŭ formoj havas plej  
ofte signifon tre parencan. *Ne forta* kaj *malforta*, *ne  
bela* kaj *malbela*, *ne glata* kaj *malglata*, *ne agraba* kaj  
*malagrabla* diferencas nur per tio, ke la mal-formo estas  
pli emfaza ol la formo nea; la esenca signifo estas  
preskaŭ la sama: ambaŭ formoj signas (pli aŭ malpli  
emfazan) *negativecon*.

Ĉe kelkaj adjektivoj la diferenco estas pli granda,  
sed estas interese, ke ĉi okaze la diferencon oni devas  
klarigi per verboj. Tiel estas pri *neutila-malutila*; tiel  
estas ankaŭ pri *nebona-malbona*, se oni parolas pri homo  
(nebona homo: ne ema helpi, utili; malbona homo: ema  
malhelpi, malutili). Sed se oni parolas pri aferoj, la dife-  
renco jam forviŝiĝas *ne bona* esprimo kaj *malbona* es-  
primo diras preskaŭ li samon.

El ĉi tio sekvas, ke ne valoras la penon multe cerb-  
umi ĉe adjektivo, ĉu ĝi havas kontraŭon aŭ ne: se oni  
volas pli emfazi la *negativecon*, oni povas trankvile preni  
la mal-formon. Tute bonaj vortoj estas do ankaŭ la  
(zamenhofaj) *malĝusta* kaj *malcerta*.

Nun ni rigardu la vorton *malhavi*. Ĉu *havo* vere ne  
havas kontraŭon? Jes ja! Ĝia kontraŭo estas la manko,  
kiun oni sentas, la malpleno, kiu kvazaŭ oŝedlas en la  
loko de la nehavata aĵo, do: ne nur negativa nehalvo, sed  
pozitiva bezono de la nehavata objekto. *Malhavi* do sig-  
nifas: havi (konscie) la mankon de io, senti la mankon  
de io. Do ĝi havas signifon, por kiu oni ne nur *ne havas*,  
sed ankaŭ *malhavas* esprimon en Esperanto. Oni eĉ eks-  
perimentis (jam antaŭ la milito) per *mankumi*, sed ĉi  
tiu vorto (verŝajne pro sia neklareco) ne povis enradikiĝi.  
Male, *malhavi* estis jam plurfoje uzata, plurfoje registrita  
en vortaroj, ĝin enhavas ankaŭ la vortaro de *Wüster*.

K. Kalocsay.

# Pri iu ekirinta serĉi la Veron

— Hans Moder, Praha —

Oni diras: kiam la azeno bone fartas, ĝi iras por danci sur glacio.

Kelkiu homo sentas jukadon sur la dorso, kiam li longe ne havis jam ĉagrenon, kaj iras serĉi aventurojn.

Nun ni audu.

Foje iu eliris por trovi la veran veron. Por kiel eble plej profunda esploro li sin turnis unue al la plej proksima objekto: al sia edzino. Bone. Li ricevis de ŝi vicon da verajoj koncernantaj lin, sed eĉ ne unu vereton, kiu koncernis ŝin.

Ne, tiamaniere li ne atingos la fiksitajn celojn. Li iris al siaj amikoj. Tie la afero okazis inverse: ili rakontis multajn verajojn pri aliaj konatoj, sed eĉ ne unu vereton pri li.

Kien nun? — li meditas. Fine li decidis viziti la kuraciston, ĉar tiuspecaj. — kutime filantropaj homoj certe ne fikcias, tiom malpli blufas.

»Mia kara — li aŭdis — se mi dirus veron, mi tuj perdus la tutan fidon de miaj pacientoj. Kaj ĉar la fido de miaj pacientoj je mi estas mia plej potenca helpo, pli potenca ol mia fido je mi mem, mi vere ne riskos ĝin perdi.«

Ce la advokato, la rezulto estis tute malagrabla: oni

lin kaptis post la prezento de la peto kaj en la sekvanta momento li sidis sur la pavimo, pripensante, kien nun?

Ho! — li batis sian frunton — ke mi ne turnis tuj miajn paŝojn al tiu trankvila pordo! Rapide li kuris al la parohestro: tiu estas ja konfidita esti protektanto de l' vero.

»Veron? — tiun ni trovos nur en la ĉielo!« — respondis per oleita voĉo tiu bone nutrita animo, kaj dum li rulis unu okulon al la plafono, per la alia li rigardis la demandinton iom suspekto. Ĉi tiu ekkaptis la klinkon de la trankvila pordo.

»Ne, pri tiu solvo mi dankas. Eble, kiam vi revenos iam de tie, ni preparolos la aferon pli detale.«

En la apuda strato loĝis mondfama filozofa. Tiu, nur tiu cerbumas sendube pri la Vero.

Li frapis sur la pordo. Malagrabla grumblo eksonis interne. Ĉu pri la Vero vi sciolas? Bona Dio! Rigardu ĉirkaŭen: kiom da libroj mi jam skribis dum mia vivo, sed, kvankam mi rompis al mi la kapon preskaŭ ĝis la kredo de mia kranio, la Veron ĝis nun mi ne trovis. Adiaŭ!«

Sekvis konata redaktoro. Tia scias kutime ĉion.

Sur lia sojlo sidis grasa mensogo kun ega buŝego kaj kun dikega ido en la sino kaj grimacis per la tuta vizaĝo, kiam la verserĉanto deklamis sian deziron.

»Vero? Tiu artiklo neniam venis inter miajn fingrojn. Kio ĝi estas? La vorto mankas en mia vortaro.«

Nun en la kapo de nia homo ekfulmis ideo: ekzistas la gazeto nomata »Vereco«. Avide li trafolumis tutajn jarkolektojn. Nu jes: por ebligi la eldonon de ĉi tiu bedaŭrindaĵo, ĉiu opa verajo estas en ĝi vestita per multkoloraj ĉifonoj, por ke en la groteskaj vestoj neniu rekonu la originan virgulinon.

En profunda arbaro vivis ermito, tute flanke de ĉiu moderna vivo. Di-simila saĝulo, kiu nenium devis timi sur la tuta tero, ĉar li sin nutris nur per radikoj kaj akridoj. Li akceptis afable la vagulon jam preskaŭ malesperan.

»Vero? Nu, ĝi, en sia pura formo, ĝis nun neniam estis kulturata en nia mondo. Ĝi aperos eble nur tiam, kiam ĉiuj konferencanoj, ligoj, kunsiduloj, diplomatoj, procentuloj, partioj kaj similaj potencoj estos liveritaj al la eterna juĝo. Ĝi aperos eventuale, se ia superhoma povo kuraĝus ĝin planti en speciale preparitan animon: sed, laŭ mia scio, tio estus tre danĝera eksperimento.«

Laca je menso kaj korpo nia verserĉanto hejmeniris, sidigis sur la kanapo por pripensi.

Jen, la homoj havas cerbon, el kiu oni povas ellogi ĉiajn miraklojn, escepte de manpleno da pura vero.

Kongresoj, ligoj, kunsidoj, interkonsiladoj sidas, sidas, sidadas, premas la cerbojn kaj la rezulto — la sama. Al kiu nenio venas en la kapon, tiu maltrankvile frotas la sidkarnon tien kaj reen, ĝin streĉas kaj turmentas — vane. Kio estas kulpa? Eble la pozicio? Oni devus fari *kunstarojn*. Tiam eble oni pli taŭge elektus la interkonsilantojn. Ĉar estas klare pruvite, ke la posedantoj de la plej potencaj, plej kunsido-taŭgaj sidkarnoj generas tro maldikajn pensojn. Pri la  *piedoj*  almenaŭ ne estas ĝis nun evidente pruvita la samo.

Aŭ, ĉu tiu estis prava, kiu diris, ke la homaro sidu sur sia cerbo? Eble tiu renversita stato estas la stato ĝusta, kaj la nuna stato, ŝajne ĝusta, estas renversita ridinde kaj mizere?

## La rabitaj kisoj

»Maria«, diris la patrin',

»Jen, vere, io bela!

Vi lasis, ke vin kisu vir'

Kaj eĉ, dum tago hela!

Se brava resti volas vi,

Ne *decas ti*, vere!

Ne p'u okazu tia hont'.

Mi dirus plej severe!

»Ej, panjo.« diris la knabin',

»Riproĉojn kia! fari?

Mi volus scii, kiel mi

Ja povis kontraŭstari!

Portante du sitelojn mi

Tra nia korto iris.

Jörg venis, ne tro petis min.

Sed simple al si tiris.

Kaj kaptis min sub la menton',

Kaj kisis min rabiste,

Pro l' du siteloj devis mi

Toleri senveziste.

»Toleri!«, kriis la patrin'

»Ho, ne pretekstu vine!

Vi povis jeti ilin for

Kaj vin defendi mune!

Kaj diras nun Maria, dum

Kapline ŝi hontemas:

Pri ĉio pensi ne eble ju,

Kiam pri kisoj temas.

El la germana: K. Kalocsay



# OBSERVO

## MARIONETLUDOJ EN JAPANUJO

La origino de la marionetludoj perdiĝas en la genezo de l' homa kulturo. Same kiel popolkantado, pupludoj estas pramalnovaj. Ju pli longa estas la kulturhistorio de iu nacio, despli artaj estas ĝiaj popolkantadoj — kaj ankaŭ marionetludoj. En Japanujo, post trimiljara kulturevoluado, popolkantadoj kaj marionetludoj ambaŭ atingis respektindan altecon de arta nivelo.

La pritaksado de ĉiu alte evoluinta arto estas malfacila kaj postulas iniciaton. Ju pli komplika estas iu arto, despli longa devas esti la prepara studo por ke oni ĝin povu ĝui. La kompreno de japanaj marionetludoj postulas do kiel eble plej bonan konon de la speciale japana aero kaj ankaŭ senkondiĉan akcepton de la *konvencioj de marioneta teatro*. Kiam la vizitanta okcidentano iras por la unua fojo al Bunraku-za, tiu mondfama marioneta teatro en Osaka, li subite troviĝas en nova, nekonata kaj mistere bela mondo, kies altan arton li nur povas konjekti per intuicio, sed ne ankoraŭ kompreni per logiko pro la nekutimeco de la scenmetado kaj stranga prezentmaniero. Ju pli li penetros en la konvenciojn de tiu ĉi speciala arto, despli li fariĝos ĝia pasia adoranto kaj iom post iom la spirito de japana arto eniros lian animon... samkiel la muziko de Beethoven fine konkeras la koron de persistema japano.

»Ningjo-Sibai« (Pup-teatro)! Estis tempo, kiam vi regis sur la japana scenejo kiel absoluta monarko. La plej granda dramverkisto en la japana literaturo, la granda Cikamacu Monzaen skribis siajn senmortajn teatraĵojn ekskluzive por pupoj. Tuta konstelacio de grandaj verkistoj pacience ellaboradis la repertuaron de la kabuki-teatro, hodiaŭ ludata de homaj aktoroj, sed tiutempe de senanimaj marionetoj. Senanimaj! Ne, pli animaj ili estis ol homoj povas iam aspiri, dank' al la krea genio de lertaj »nevidebluloj«.

Kio estas nevideblulo? Generale ĉiu persono, kiu aranĝas la scenejon, vestita en konvencie nigra mantelo kaj maskita per kapuĉo, kaj kiu dum la ludo, antaŭ la okuloj de la rigardantaro — estas konsiderata kiel nevidata. La komencanto estas ĝenata de ilia ofta apero — sed iom post iom lia atento koncentriĝas al la marionetoj, al la progreso de la drama intrigo — kaj perdas el la konscio la nigrajn siluetojn de la »nevidebluloj«. Ĉiu marioneto estas funkciigata de tri specialistoj: la ĉefo zorgas pri la kapo kaj la dekstraj mano kaj brako, lia helpanto direktas la movojn de la maldekstraj mano kaj brako kaj lernanto, ĝenerale knabo direktas la gambojn kaj piedojn. Tiuj tri pup-direktoroj(!) estas vestitaj nigre ĉe klasikaj historiaj dramoj, ĉe pli modernaj teatraĵoj ili forlasas ĉe tiun eksteran signon de nevidebleco — sen ia ĝeno al la publiko. En la antikvaj tempoj la pupdirektantoj estis kaŝitaj sub la estrado aŭ malantaŭ ĝi, simile al la primitiva pupteatro en Eŭropo

Tiel meditadis sur sia mola sofo nia verserĉanto, ĝis fine li ekdormis. Kaj tiam, en sonĝo, li trovis la delonge serĉitan Veron.

Li vekigis, frotis la dormon el siaj okuloj, kaj, kun heroa decido, li ekiris — anonci la Veron.

Vespere li revenis kun blua dorso, animo dolora de insulto, vizaĝo gratita de ungoj.

Cu li anoncis la Veron? Nu, li volis, sed oni ne lasis. Komence li povis diri kelkajn vortojn, sed baldaŭ oni rekonis, kia danĝera homo li estas. Kaj oni sufokis lian parolon. Kiel oni sufokis, tion li sentis ankoraŭ sur la haŭto.

Kaj tiam li decidis, ke li lasos la homaron tia, kia

-- nur en pli alta fazo de evoluo ili aperis sur la scenejo en konvencia, nigra vesto kaj finfine, en la moderna marionetludo ili forĵetis la lastan restaĵon de singardemo kaj aperas en ordinara, ceremonia kimono.

Senutile estas akcenti la gravecon de tiuj direktantoj. De ilia talento, de ilia preciza kunagado dependas la sukceso de la reprezentado. Per longa kaj pacienca laboro ili vere atingas mirindan lertecon pri la manipulado de l' marionetoj.

Sed eble la plej grava persono en la reprezentado estas la *bardo*. Li kantas kaj parolas la tekstojn de la prezentado, imitas la voĉojn de la personoj simbole reprezentataj per la pupoj, akompanas sian kanton per muziko de »ŝamisen«, kiu estas japana gitaro. Ofte kantistaro kaj muzikistaro ankaŭ kunlaboras. Ĉar la reprezentado estas tre longa — tri kaj kvarfoje pli longa ol en Eŭropo — oni kelkfoje ŝanĝas la bardon. Li sidas sur rotacia platformo, la anstataŭanto aperas do sen ĝeno kaj la reprezentado povas daŭri sen la plej malgranda interrompo. La bardo sidas »sur la kalkanumoj«, laŭ japana ceremonia maniero, en festa kimono kaj estas tre impresita, laŭ la normoj de japana propra atmosfero.

La leganto povas nun plastike inagi la scenejon de klasika marionetludo: la pupoj en fiksa pozo, subtenataj de pro tri direktantoj, la bardo ĝenuŝanĝanta ĉe la flanko, apud li akompanista muzikisto kun trikorda »ŝamisen«. La rigardantoj fikse kaj streĉe atentantaj, en multaj okuloj aperas larmoj. La tuta giganta teatro posedata de unu potenca spirito, tiu de la heroo japana mezepoko... Tiuj senzorge ridemaj knabinoj, kiujn mi vidis dum la paŭzo mangi »o'suŝi« (honorinda rizaĵo kun fiŝo!), ankaŭ ili surmetis maskon de tragedia esprimo, kvazaŭ la tuta monddoloro de generacioj aperus sur iliaj taŭzitaĵaj trajtoj Marionetoj!

Sed la vorto »marioneto« ne taŭgas por japana »ningjo«. Ĝi tiom malsimilas de la mallerta, peza kaj nedecidema pulĉinelo de la Okcidento. Dum mil kaj unu feaj reprezentadoj, la japana »ningjo« akiris tian precizecon de la gesto, tian esprimpovon — jes, ja spite al la neevitebla rigideco de la trajtoj — ke la plej grandaj aktoroj vivantaj povus envii ilin. En Eŭropo ankoraŭ oni ĝenerale kredas, ke marionetludo estas por la infanoj. Ĉiu degeneriginta arto fariĝas amuzaĵo por infanoj — samkiel degenerigintaj vortoj fariĝas kalumnioj... Nur en Lyon ekzistas pupteatro — eŭrope fama — kiu subtenas la tradiciojn de marionetludo en la ĝusta senco. Sed en Japanujo ekzistas nur unu pupteatro, tiu arta skolo, kiu evoluis dum centjaroj al alteco komparebla nur al Fugijama. Oni ankaŭ ne devas imagi, ke »ningjo« estas simila al la eŭropa pulĉinelo. Ĝi estas preskaŭ tiel granda, kiel la persono, kiun ĝi reprezentas.

La unua balado por marionetludo, kiun oni konas, estas nomata Sinjorino Joruri. Joŝicune, heroo de multaj legendoj japanaj, venas al la domo de Joruri kaj restadas en ĝi kiel gasto de la mastro, patro de Joruri. La ĝunuloj enamigis. Ĉar la kavaliro devas foriri al milito, lia amatino sentas sin tiom forlasita, ke ŝi mortigas sin en rivero. Dum pluraj jarcentoj la popolo kantis pri tiu ĉi malĝoja tragedio, kiam fine ĝia muziko estis adaptita

ĝi estas. Li ne estis heroo, li preferis la pacon al la vero. La azeno falis sur la glacio.

Sed tio ne estis tiel facila. Ne vane oni diras, ke la vero fiodoras. Oni ekflaris, ke li scias la veron. Kaj li devis ege multe uzi la parfumon de la mensogo, por kaŝi tiun fiodoron.

Por konsoli la kompatemajn legantojn, mi diras, ke fine li tamen sukcesis. Lin reakceptis la societo.

Nur unufoje li ankoraŭ refalis. Senkonscie kaj senpripense li foje diris la veron pri la edzino al la edzino mem. Ĝin li eldiris ĉi-foje plene kaj komplete. Ĉi tio estis lia sola plene eldirita vero. La rezulto estis argila pota frakasita sur lia kalva kranio.

# MIA ANĜULO

— JULIO BAGHY —

## DUOBLA JUBILEO

Hodiaŭ, kiam la kvardekjarulo sentas sin maljunulo kaj la dudekjara generacio nomas sin celperdinto, nun, kiam la politiko plene subpremas la kulturon kaj ĝi mem erarvagadas en sia prepreferita labirinto, kiam konferencoj, fiaskas kaj fiaskoj kreas novan situacion kaj nun, kiam la pesimista oportuna principo »naĝi laŭ la fluo« jam fariĝis preskaŭ morala devo kaj la fatalismo enradikiĝas kiel moda religio, vere estas malfacile resti optimisto kaj esperi eliron el la haoso. La nebulo de la diversaj interesoj kaŝas la horizonton kaj la perspektivo malvastiĝas, aŭ kelkfoje eĉ perdiĝas. Oriente abunde fluas la homa sango, okcidente la misero banas sin en larmoj kaj la tuta mondo veadas, baraktas, ŝiras sin mem kaj ni... ni, esperantistoj, fanatikuloj de pli bela estonteco, jubileas, haltas por spirmomento ĉe la atingita mejloŝtono kaj ririgardas al la irita vojo.

UEA festas la 25-an datrevenon de sia fondaĵo kaj okazos la 25-a Universala Kongreso de Esperanto. Duobla jubileo en la mezo de la haoso. Tio ĉi povas ŝajni tragikomedio por multaj laĉgintoj kaj por tiuj, kiuj senbatalate dezirus atingi venkon. Mi ne riproĉas ilin. Trasferitaj horoj instruis min por kompreni la unuajn kaj batalvundojn igas min indulgi la lastajn. Guste tiu ĉi duobla jubileo hardas mian fidon en la mezo de la haoso. Ili estas du modestaj meĉlumoĵoj en la nokto kaj ĉirkaŭ ili maldormas vige la gardantoj de noblaj promesoj. Tiuj du meĉlumoĵoj brilelas por miloj da sennomaj batalantoj kaj mi neniam estis tiel forte konvinkita kiel nun en la kriza momento, ke nia afero marŝas antaŭen por utilo de la tuta homaro. Tiun ĉi fortan kredon ne povos malpliigi la moderaj sukcesoj de la jubileoĵoj, fest-

al la »ŝamisen«. De tiu tempo ĉiu balado laŭ la sama stilo estis nomata »ĵoruri«. En alia skolo oni kantas pri herooj, lojaleco al feŭdala ĉefo (daimo), memofero por granda afero kaj estimo al gepatroj. Ĉar tiuj ĉi ideo-kompleksoj estas psikologie fundamentaj ĉe japanoj, oni povas konjekti, kian grandan emociion en la rigardantoj elvokas tiuj marionetoj, tiel senvivaj por la »barbara fremdulo.

Kurioza fakto pri la marionetoj estas, ke iliaj piedoj estas ekipitaj per longaj, lignaj stilzoj, kiuj ebligas al ili altiĝi al homa grandeco ĉe la kulminaj momentoj. La piedo estas fiksita sur tiuj stilzoj same kiel piedo sur »geta« aŭ japana lignoŝuo (per fadeno inter la dikfingro kaj ceteraj piedfingroj). Ĉar la grandaj marionetoj estas sufiĉe pezaj, speciale kiam ili reprezentas kavaliron kun kiraso kaj armiloj, tiuj longaj stilzoj estas granda ĝeno por la direktistoj, precipe dum rapida agado.

La okuloj de la marionetoj estas moveblaj supren, malsupren kaj vertikale en ambaŭ direktoj. Ili povas levi la brovojn, por signo de surprizo kaj kolero. La buŝo povas malfermiĝi kaj fermiĝi. La manoj estas flekseblaj kaj permesas senfinan varion de gestoj. La gamboj kaj piedoj ŝajnas esti kontraŭe mal'ertaj, kvazaŭ la perfekteco de la supra parto igus perfektecon nenecesa malsupre. Kelkfoje oni havas la impreson, ke la pupoj marŝas ŝvebante en la spaco. Sed kiam ili sidigas laŭ la karakteriza japana maniero, ili estas nesupereble fidelaj al la vivo.

Kulturitaj rigardantoj tuj rekonas la diversajn marionetojn sur la scenejo — ne nur pro familiareco al la teatraĵoj — sed juĝante pri la vestaĵoj, kiuj indikas la rangon, aĝon kaj okupon de la personoj. La vizaĝoj apartenantaj al famaj »ningjo« estas neimiteblaj trezoroj, kiujn oni gardas de centjaroj kun ĵaluza zorgemo. Brakojn oni ofte ŝanĝas, sed la kapoj restas ĉiam la samaj. Neniu artisto kapablas reprodukti ilian simplan sed tiel esprimovan mienon. Ĉiuj varioj de la homa karaktero estas do esprimataj per lerta kombinado de gestoj, pozi-

ciaj inter premaj ĉirkonstancoj. Mi ne juĝos laŭ la ŝajno. Ĉiutage pli kaj pli firmiĝas en mi la kredo, ke nia venko proksimiĝas.

La anemia mondpercepto de maljuneco, la sklava humilo antaŭ malutilaj tradicioj, la respekto al glorigitaj malbonoj ŝpinis la retaron de la haoso, sed laŭ la historia instruo oni ne povas subpremi definitive la erupcion de la freŝa spirito de la junularo. La nuno estas agoniado de la laŭdukiĝinta spirito kaj baldaŭ, tre baldaŭ, d'evolviĝos la juna freŝo de tiu generacio, kiu nun katenite baraktas. Iu ĉi junularo savos la mondon, solvos la krizon, ĉesigos la haoson kaj kreas tiun novan atmosferon, en kiu pompan vivon havos la nun paliĝantaj sopirfloroj. Jes, baldaŭ, tre baldaŭ!

Ne ridetu pri mia optimismo! Aŭ, ridetu, se tiel plaĉas al vi! Egale por mi. Mi memoras pri tio, ke kelkaj el miaj amikoj nomis mian romanon HURA! tro fantazia satiro kaj i i neniel povis prezenti tiujn scenojn ankaŭ realgeblaj. Bedaŭrinde, hodiaŭ jam multaj konfesas, ke mia satiro fariĝis aktuala kaj reala teruro. Dum ĝia verkado mi estis inspirita de antaŭgnoj de tiu mondrenversigo, en kiu ni ankoraŭ falos pli malsupren, sed de post semajnoj inspiras min la antaŭsignoj de sana spirito, kiu per sia juna idealismo energie reordigos ĉion. Egale, de kie ekiras la resaniga fluo. Ĝi erupcias. La 50-jara jubileo de Esperanto jam trovos pli da komprenon en la mondo. Nia devo estas tre simple konceptebla: persiste labori ne nur por la kvanto, sed ankaŭ por la kvalito.

Okaze de la nunjara duobla jubileo respektplene mi riverencas antaŭ la memoro de niaj pioniroj kaj de niaj unuaj verkistoj, kies heroo laboro faris el bela utopio vivantan realecon. Estus ne nur dece, sed ankaŭ inspiropove, se unu el la oficialaj kunsidoj de la Jubilea Kongreso estus dediĉata al ilia memoro. Mi ne scias, ĉu L. M. partoprenos per speciala aranĝaĵo en la jubileo? Se jes, mi esperas, ke ĝi ne forgesos pri ili.

cioj kaj pantomimo, dank' al la arto de la direktantoj. Estis tempo, kiam la veraj aktoroj studis la movmanieron de la pupoj kaj ilia idealo estis perfekte imiti ilin. Sed ĉar la vizaĝo de marionetoj estas preskaŭ senmova, la gestoj devas kompensi la mankon de la esprimovo surtrajta. Tamen, eĉ en nia tempo, famaj aktoroj, kiuj ludas en historiaj dramoj, ofte estas vidataj en marioneta teatro — kie ili rigardas sin mem, kiel la publiko rigardas ilin.

En nia mondo de banalaj radio, kino kaj jazo estas bone refreŝigi la spiriton vizitante marionetan teatron en la pitoreska Japanujo...  
Jozefo Major.

STATUO DE PIERRE LOTI SUR LA INSULO TAHITI. Apenaŭ videbla eta »punkto« estas sur la surfaco de l' tero la insulo Tahiti. Ne multe pli ol 10.000 homoj vivas sur tiu ĉi koralinsulo, el ili 3000 aŭ 4000 en la urbo Papeete, kie oni nun inaŭguras la statuon de Pierre Loti. Tamen, tiu ĉi pigmea insulo de la senfina »Silenta Oceano« — vivas en la publika scio. Konata nomo estas la Vaihirsra, la sola lago sur la insulo Tahiti. Rivero ne estas sur ĝi. Sed inter la montaj riveretoj la Papene ofte ŝajnas granda rivero. — Unua ico estas la merito de la romantika vivo kaj dekora arto de Gauguin. ke la eta Tahiti-insulo ricevis vastan lokon en la publika scio. Sed estas ankaŭ vere, ke la merito de la malkovro, nome la literatura malkovro apartenas al la plumo de Pierre Loti. Sed Pierre Loti ja malkovris tiom da aliaj lokoj. Kaj guste ĉe la malkovro de Tahiti ne havis veran trabatan forton la plumo de Pierre Loti. — Tahiti ja estas tamen — la insulo de Gauguin. La instinkte kaj intence primitivaj bildoj, la instinkte kaj intence primitivaj skribaĵoj de Gauguin faris tramonde interesa ĉi tiun malgrandan pecon da tero. (Kaj poste tiu grandioza romano, kiun verkis Somerset Maugham kun malvarma sobro, rigida objektiveco pri la daŭg, grandioza parto de la vivo de Gauguin). — Borsoagento subite turnas dorson al Parizo, al negoco, al la familio: kaj ekiras — al la



insulo Tahiti por pentri... Pentri tute aliajn bildojn. ol kiajn ĝis tiam oni pentris. Ankaŭ la mankhavo de la teknika scio akcelis, ke Gauguin atingis tute individuajn stilon. La perspektivo preskaŭ tute mankas sur liaj bildoj. Generale li havas malmultan senton pri la plastiko, pri la tria dimensio. Li vidas en surfacoj. Ankaŭ el liaj koloroj mankas la transiroj, la nuancoj. Senrompe, krude interpuŝigas la kolormakuloj... — Sed kie jam la moko, kiu komence akceptis la bildojn de la »cerbmalsana« bors-agento? — Nun oni jam klare vidas: la pentrista stilo de Gauguin estas necesa evolua-historia ĉapitro sur la vojo de l' arto. Kvankam tiu ĉi maniulo forŝirigis de ĉio, de ĉio. Li atakis la tradicion. Li ne zorgis pri la samtempuloj, nur sekvis rigide — siajn inkubsonĝojn. — Ne vane diras la Korano: *anticipe estas fiksitaj la trairitaj vojoj, la atingitaj celoj*... Nura memtrompo, se la migranto kredas, ke li mem elektis la celon, li mem elektis la vojon. Sur la Tahiti-insulo Gauguin ne plu zorgis pri tio, ke ekzistas urbo, kies nomo estas Parizo. Li opiniis: ke en ĉio li plene sukcesis forŝirigi de la Pariza kulturo, de la Parizaj memoroj. Sed propre tamen la pentron de Parizo li portis antaŭen per nova evolua stacio. Kiom ajn malpli li estis profesia pentristo. Kiom ajn amare li turnis dorson al Parizo. — Sed ne Gauguin ricevas statuon en la urbo Papeete. Kvankam Gauguin ekloĝis sur la insulo Tahiti, dum Pierre Loti nur ekskursis tien. (Ne parolante pri tio: kiom pli elementaj artofortoj disradias el la bildoj de Gauguin, ol el la mildaj, bele gladitaj romanoj de Loti.)

La statuon tamen meritas Loti. Ĉar li estis vera verkisto. Subtilaj okuloj, polurita gusto, riĉa, multkolora vortaro. Kaj kiel mallautis li sciis paroli... — Liaj grandaj sukcesoj jam iom velkis. Ne hieraŭ venis unue la demando: ĉu la »Papilifraŭlino« estas japana knabino, aŭ nur sentimental, malproksime erarvanta pariza *midinette*? Kaj similaj »difektoj« estas pri liaj ceteraj famaj libroj. Pri tiuj libroj, en kiuj li malkovris »novajn mondojn« por la franca leganta publiko. Tiujn ĉi novajn mondojn, tiujn ĉi ekzotikajn regionojn vere propraokule vidis Loti, la ŝip-oficiro, kiu ne povis disigi de sia milita ŝipo, eĉ kiam li jam fariĝis per siaj libroj fama, riĉa homo. Sed vane travojaĝis plurfoje la mondon Pierre Loti: ĉie li ekvidis nur la scenejan dekoracion. La novecajn kolorojn, la nekutimajn liniojn, la pitoreskajn »ksteratojn«. Neniam li vidis tion, kio vere disigas la Orienton kaj la Okcidenton. Neniam li vidis tion, kio, malgraŭ la profunda fendego, kunligas tamen Orienton kaj Okcidenton. Unuvorte: la ko'orrĉiaj libroj de Pierre Loti iom senkoloriĝis. Reciproke: *kolor ĝs liaj grizaj* libroj. Kiuj parolas simple pri bretonaj fiŝkaptistoj, aŭ pri la vivo de Normandia vilaĝo. Kaj ĉefe »*Mia frato Yves*« vivas longe. Kvankam tiu ĉi Yves estas franca kamparanjuno. Kaj ne turka haremanino. Nek japana samurai.

En la artospeco de la »kolonia romano« oni treege superis la pioniradon de Pierre Loti ankaŭ en Francujo. Kaj ankoraŭ plie oni superis — ĉi tiun *modestan komucon* en Anglujo. Ĉefe eble *Somerset Maugham*. Inter pluraj aliaj per la *Gauguin*-romano. Li ne vane estis longe kuracisto, eĉ tre bona kuracisto en la mondo de l' kolonioj: ankaŭ en siaj romanoj li nudigas tiujn strangajn, superfluaajn skarabojn de Dio, kiuj portas la nomon: *homo*. Li metas la stetoskopon sur la nudan haŭton kaj ĉiel li elaŭskultas la baton de l' koro... Anstataŭ la multkolora sonĝomondo de l' kimonoj, turbanoj, ĉi tie estas vera vivo. La ĉiam alia, la ĉiam sama vera vivo. — Senin-ŭlga, malvarma verkisto estas Maugham. Aŭ almenaŭ li skribas per glacimalvarmigita plumo ankaŭ sub la tropika suno. Sed kiel belega estas la ekiro de la *Moon and Sixpence*: la stranga adiaŭo de sia familio de la borsagento. Kaj kiel grandioza estas la fino: la vera, la granda apoteozo. Sen ia solena vorto, sen ia solena turno... La »*Moon and Sixpence*« kelkloke libere, arbitre devias de la »aŭtentikaj« faktoj. Tamen kun la plej ĉefa aŭtentikeco ĝi deŝignas kaj klarigas la problemon de la vivo kaj peniko de Gauguin. Tiun ĉi tre komplikajn, aŭ tre simplajn problemon. — La statuon de Pierre Loti estus multe pli ĝuste starigi

en la naskovilaĝo de Yves-frato. Aŭ ĉe sur la bretona bordo.

Pierre Loti, laŭ sia koro, estis vera pasaĝero. Sed ĉien li kunportis la memoron de Parizo kaj de la franca vilaĝo. Tra Parizo, tra franca kamparano li vidis la svarmon de *Joshiwara*, aŭ la vivon de *Ayizodé*... Sed la vojaĝo tra foraj akvoj, tra foraj regionoj estis por li vivbezono. — Ankaŭ tiam li vojaĝis, ĉe proksime al Suda Cinujo, kiam la membroj de la franca Akademio decidis pri lia senmorteco. En sia seĝokupa parolo rakontis ĉarme, modeste Loti: en la haveno malgranda vaporbarko rapidis antaŭ la mi itŝipon. Ĝia ferdeko estis tegita tute per blua papero. *Petit bleu*: la telegramojn la franca poŝto ekspedis sur blua papero. Laŭorde oni ne kutimis porti la poŝton antaŭ la ŝipojn... Kiam Loti ekvidis la vaporbarkon plenan de telegramoj, kiu rapidis antaŭ la militŝipon: li jam sciis, pri kio temas. La gratulajn telegramojn sendis antaŭ la novan senmortulon la estro de la haveno... K. B.

(X.) JARL HEMMER: LA GEHENO. El la senfekunda Nordo, kiu estas tiel neelĉerpeble riĉa en spiritaĵoj produktoj, ree sin anoncas nomo, hodiaŭ ankoraŭ ne multe konata, sed morgaŭ jam festata en la tuta kulturmondo. Pasintjare Jarl Hemmer en la granda romankonkurso gajnis la unuan premion per sia verko »Geheno« kaj hodiaŭ la romano jam aperis germane, finne, norvege kaj dane, kaj tre baldaŭ elvenos ankaŭ la holanda, kroata kaj angla tradukoj. La aŭtoro naskiĝis en Finnlando, sed verkas svedlingve: estas kvardek-jara, travojaĝis Eŭropon, estis instruisto, redaktoro; fine li alboridiĝis en la libera rodo de l' literaturo kaj per sia laŭrita romano li feliĉe eniris en la vivantan fluon de la mond-literaturo. La »Geheno« estas tre malĝoja kaj tamen eksterordinare edifa verko de granda intelekto kaj granda koro. Kiel malĝoja kaj edifa estas ankaŭ la »Raskolnikov«. La heroo estas Johan Samuel Strang, lutherana pastro, tempest-temperamenta, kiel-viva homo, kies juneco pasis en ĉia imagebla malpuraĵo, en la rubaĵo de l' antaŭurbo, en la societo de l' vulgaraĵoj homoj; kaj konateco kun servistino lin portas ankaŭ en carceron. En la carceron la mizera kulpo, la falinta pastro trafalas en revolucia anim-ŝanĝiĝo, li puriĝas, trovas sian Dion tiom longe vane serĉatan... Li surprenas servon en kaptit-armeo, kie mizeraj viktimoj atendas sian malĝojan sorton. Kaj kvankam tiuj ĉi mizeruloj murdis senindulge ankaŭ lian propran fraton, la pastro vidas nun jam nur la homon en ili, laŭ sia eblo li klopodas plifaciligii ilian sorton kaj fine memvole li iras en la morton, por savi per tio la vivon de unu el la plej grandaj kulpuloj... La »Geheno« estas propre tiu ĉi kaptit-armeo. Sed en la ideomondo de l' poeto, moralisto kaj filozofo vastiĝas tiu ĉi geheno: la tuta mondo estas geheno; la homa vivo estas nura kulpo kaj nura damniĝo; la filoj de Dio mordas kaj murdas unu la alian. Al la ĉielo fetoras la hekatombo de l' kadavroj, kiun levis la mondmilito »ad maiorem Dei gloriam«. Vidinte ĉi tiun teruraĵon, rompiĝas la kredo de l' kredanto; la Di-kreda animo perdas sian Dion; la fortulo falas malforte kaj neniiĝas. Sed la malfortulo leviĝas, puriĝas kaj el la haoso de l' perdiĝinta mondo li vidas malvolviĝi la *Kosmon*, la supran mondordon kaj solvas la kaŝitajn tendencojn. — En la carceron Johan Samuel Strong, kiu nun jam uzis la nomon *Bro*, por ne hontigi sian honestan familion, havas ankoraŭ tute individua istajn principojn. »Mi suferas, mia dekstra kaj maldekstra najbaro suferas kaj la tuta longa vico. Sed ĉiu el ili suferas pro si mem. Oni ne povas diri, ke la tuta carceron suferas, ne ekzistas tia amasestajo, kiu havus unusolan korpon kaj unusolan animon. Ne ekzistas amasviro kaj ne ekzistas amasmorto... Kiofoje du okuloj estingiĝas: ĉesas la tuta ekzisto: arbaroj, lagoj, urboj, la firmamento...« Longa tempo necesas por la kulpa pastro, ke li rekonu la kuman vivon, la kuman suferon de la granda kolektiveco. Ankaŭ tiu decidiĝo, ke li fariĝos pastro, koncipiĝis en kulpo. Li ja ne kredis; ne akceptis la dogmojn; havis konstantan batalon ne nur kun siaj

superuloj, sed ankaŭ kun Dio mem. Jen lia opinio pri la scienco, kiun li elektis por si profesio: »ĝia kerno estas kelkaj ŝtonduraj, maljuniĝintaj dogmoj, ĝin ĉirkaŭas moviĝema, mola pasto kiun la moderna esploro ofte ŝanĝas.« Kriston li ne neis; sed en Li la plej mirigan ekfloron kaj plenumiĝon de homo li admiris kaj amis. — Pastro Bro havas infanaĝan amikon, *Hastig*, ankaŭ pastron, kiu havas ĝuste malan naturon. Forta, konscia, kredulo sen duboj, konsekvenca preskaŭ ĝis dezerteco kaj persistema sur la landvojo pavimita per la akra gruzo de l' devoj. De junaĝo ili batalas unu kun la alia, pro tio ili estas tiel sindonaj unu al la alia. En la kaptitar-fermo ili ree renkontiĝas, ili duope aranĝas la pastran laboron. Amara laboro: La kaptitoj maŝatas la pastrojn kaj fierege refutas ĉian animan konsolon. *Hastig*, la fortulo, rompiĝas en tiu ĉi abomena servo. — Inter la tag-post-tage ripetigantaj teruraĵoj de l' Geheno trudiĝas la plej peza problemo en la animo de la du pastroj, kiu jam maŝperigis kaj preskaŭ frenezis tiom da filozotoj, teologoj kaj poetoj. Kial ne inkulis Dio en ĉiun homon la saman opinion pri ĵusto kaj malĵusto? La barbaron trakuras maldika sulko: landolimo. Ambaŭflanke la samaj abioj, la vento senbare blovas super ĝi, la sovaĝbestoj senzorge trairas ĝin; tamen, kio estas ĉi tie bona, transflanke tio estas malbona. Ĉu estas eble, ke ankaŭ la Malbono devenas de Dio, fonto de ĉiu boneco? *Hastig* perdas sian kredon, kaj en terura plendo li elverŝas sian senreviĝon: »En la nomo de ĉiu indulgo mi vin akuzas, Dio, el la profundo de tiu ĉi tera infero! Kiel vi toleras ĉion ĉi tion, senfina Boneco? Vi sendis nin en la valon de l' lamentoj, sed anticipe vi ankaŭ damnis nin. Vi pesis nian bonvolon, sed vi sciis, ke ĝi estas malforta por lukti kontraŭ la Malico. Respondu por tio, kion vi agis, se vi scias!« Li, la kredulo, unue fariĝis dubanta, poste neanto. Kaj Bro iras ĝuste la malan vojon. Li neis, dubis kaj nun kredas. Nur tiu ĉi kredo faras lin kapabla por la memvola martireco. *Hastig* fine fuĝas. Kaj Bro sin miksas inter la kaptitojn, partoprenas en iliaj suferoj kaj mortas anstataŭ tiu kaptito, kiu murdis lian fraton. Ĉar la sufero estas terura nur por tiu, kiu finrigardas ĝin. Kiu estas en ĝi, por tiu ĝi jam ne estas tiom neeltenebla.

Jarl Hemmer estas majstro de la rakonto kaj same de la paroligo. Preta dramverkisto, ĉu mi rigardu la internajn konfliktojn de liaj herooj, ĉu la ravan viglecon de liaj dialogoj. Sed plej mirinda li estas en la *priskribo*. Kiel li rakontas la rifuĝon de l' fiŝkaptistoj sur la naĝantaj glaciopecoj de la fjordo: tiel nur la plejgranduloj scias pentri. Kiu komencas legi la romanon, tiu ne liberigas de ĝia sorĉo. Fine ni eble sentas inkuban premon: ni vidis tro multe da homa malboneco kaj malico. Sed kio restas memore el niaj impresoj, tio estas tamen la sento de levigo kaj purigo. Kaj danko, ke ni povis ekoni novan eminentulon de la homa kreanta spirito.

(N.) B. TRAVEN: LA MORTOSIPO. Cent milojn atingas la ekzempleroj de la *Traven*-libroj. La sarkasme vivogustaj, krudfortaj verkoj de tiu ĉi nova *Jack London* disvastiĝis en la tuta mondo. Lia unua libro, la »Mortosipo«, parolas pri ŝipisto, kiu perdis siajn legitimaciojn kaj pro tio nenie li povas akiri laboron. Ĉiu ŝtato transdonas lin al alia, senĉese. Tiel li baraktas tra la tuta Eŭropo, kvazaŭ ekzilito. Tiu ĉi parto de la libro, kvankam prezentas la okazajn mortojn serioze, efikas tamen la karikaturo de l' burokracio, respektive ĝi montras, kiel karikaturocaj estas la paradoksoj de l' ŝtata direkcio. Fine la ŝipisto sukcesas veni sur kontrabandŝipon, kiun la posedanto volas pereigi, por enŝiĝi la asekuran pagon. Tiu ĉi estas la »mortosipo«, sur kiu laboras nia heroo kiel karbŝovelisto, kaj travivas la plej mizerajn suferojn. Sajnas neimagebla ĉiu eblo de l' saviĝo, sed fine li tamen saviĝas — por veni sur alian mortosipon, kiu pereas, kaj li kun alia ŝipisto naĝas kiel ŝiprompito, sur la libera maro. La alia ŝipisto freneziga kaj sin jetas en la akvon, kaj li restas sola, atendanta la morton. Verko kun konsterna forto, kiu, malgraŭ la amara koloro, disradias

certain optimismon: ĝi sonoras la triumfon de la ĉieltena forto de la homo.

(X.) EVADNE PRICE: EVA 1933. Prefere oni povus doni al tiu ĉi amuza libro la titolon: »Demono 1933«, ĉar sub Eva ni pensas trovi la ĝeneralan knabintipon, dum *Damaris*, pri kies aventuroj raportas la aŭtoro, estas tute aparta tipo. La ruĝhara angla knabino estas tiaspeca »*Miss Sex-appeal*«, kiu rentumigas sian belon, la solan kapitalon, kiel eble uzure. Kun antaŭe pripensita intenco ŝi faras siajn atencojn kontraŭ riĉaj kaj stultaj viroj, kies monon ŝi elprenadas kun senkulpa rideto. Sia ambicio estas, ke ŝi ankaŭ edzinigu sin al iu el tiuj ĉi monosakoj, sed — tiom stulta estas neniu el ili... Je la fino de sia aventura, multkolora vivojo la bela *Damaris* tamen estos la edzino de tiu malriĉa, tamen ne tute honesta viro, kiu havas *seks-apelon* similan al ŝi, kaj kiun ŝi adoras de ĵaroj, sed ĉi tiun sian amon ŝi zorgas kaŝas, ĉar ĝi kruacas siajn ambiciajn kalkulojn.

### Pri ricevitaĵoj manuskriptoj

*Maljuna Susanoo*. Bela, vere japanspirita rakonto, bona traduko. Nur pro ĝia relativa trolongo ni devas ankoraŭ heziti, aŭ almenaŭ ĝisatendi okazon por ĝia publikigo.

*Piligrimo* (pilgrimo). Interesa ideo, sed ĝi estas prezentita tiel longe, ke ĝi tute perdiĝas en la vortinundo. Nepublikigebla.

*La ombro* de Heidenstam. Publikigota.

*La etulo* de Maupassant. Publikigota versajne, sed daton neeble doni.

*Gekolega lerno*. *Sincera mi estis*; *Sen la rozo*, *Antaŭ nova vojo*. La poemoj estas nepublikigeblaj.

*Du amikoj* de Maupassant. Estas strange, ke vi, japano, tradukas *prozon* el la franca lingvo. Nu, la traduko estas bona, sed pro certaj kaŭzoj ne publikiginda. Sed via stilo estas tiel bona, ke ni certe atendas de vi ankaŭ eljapanajn tradukojn. Aŭ, eble observojn?

*La perfidanta koro*. Kurioza laboro: novelo tradukita en versoj. Por esti tute sincera, mi devas diri, ke ĝi neniam gajnis per tio. Sed aliflanke vi montras surprizajn versfarajn kapablojn. Ĉu vi ne provus ilin per malpli stranga tasko?

*La sentebla profito*. Baldaŭ publikigota.

*La skatoleto* (tro ruzmalruza detektivaĵo), *La babilulo* (iom tro eluzita ideo), *La karnavalo en Ameriko* (malaktuala) estas nepublikigeblaj.

*Por mi la bela silenta suno* kaj *Al tiu kiu estis knucumita* ne estos publikigitaj.

*Atigu la monton tri futojn pli ol la malamika*. Kvankam la rakonto estas interesa en sia ekzotika naiveco, ni ne povas permesi publikigon. Eble, iam, sed nepre ne baldaŭ.

*La vojo de la ĉielaj steloj*. *Maro*. *Mi havas amatinon*. *En monta supro*. Nepublikigotaj. Evidente vi estas multe pli feliĉa en originalaĵoj. Ĉu vi ne havas ion belan?

*Petro-Paŭlo ĉe la bordo de la Sejno*. Nepublikigota.

*Vivo kaj laboro de literaturisto pola*. Ni publikigos la artikolon versajne baldaŭ, en du partoj, eble en tri.

*Vizio*. *Publika konfeso de Harhold*. La partoj, kaj ankaŭ via traduko, estas belaj, sed tiaj romanfragmentoj tamen estas evitindaj laŭeble, oni ĝenerale ne ŝatas ilin legi.

Pri aliaj manuskriptoj alian fojon.

### Vortoj netroveblaj en la Plena Vortaro

*Damni* (Grabowski): kondamni je infero; *dura* (Grosjean-Maupin): malmola; *evento* (Grab.): grava okazaĵo; *fascini* (Wüster): rigardsorĉi; *frida*: malvarma; *gapi* (Grab.): rigardegi absorbiginte; *h-sti* (Christaller): urĝi; *incendio* (Preso Socie'to): brulego; *iriti* (Grab.): pliflamigi; *jubili* (Christ.): ĝojkrii; *kriĉi*: akcipitre krii; *obskura* (Fulcher-Long): malluma; *sinki* (Christ.): fali malrapide.

FLAVA DANĜERO AŬ BLANKA DANĜERO?  
ĈU LA OKCIDENTO PEREOS?  
ĈU LA SAVO VENOS EL LA ORIENTO?

# Omoto Internacia

en sia pligrandigita serio  
respondos  
tiujn ĉi problemojn

Petu senpagan specimenon  
al la Eldonejo en

**Kameoka, Kioto - hu  
Japanujo**

## D U N O V A J L I B R O J

IVAN MAŽURANIĆ

### LA MORTO DE SMAIL AGA ĈENGEJIĆ

Heroa eposo kroata, trajukita de  
MAVRO ŠPICER

La perlo de la kroata literaturo

Sur 76 paĝoj, kun ses tupaĝaj ilustraĵoj, sur sen-  
ilgna papero, bele bindita, aŭfrankite svisaj frankoj 3.—  
Eldonis La Suda Stelo, Slavonski Brod, Jugoslavio

CARLO GOLDONI

### KURIOZA OKAZAĴO

Triakta komedio

El la itala tradukis  
MEVO

64 paĝa, kun tri ilustraĵoj. Prezo sv. fr. 1.50 + 10%.

Eldonis

Esperanto-Centro Itala  
Milano, Galleria Vittorio Emanuele II. 92.

Ambaŭ haveblaj ĉe Literatura Mondo, Budapeŝto

## ANIAJ REPRESENTANTOJ:

- Austrio:** Rudolf Foltanek,  
Wien, I. Herrengasse 2—4. Poŝtkonto nro 19.704
- Aŭstralio:** L. E. Thomson, p. a. R. G. Rawson,  
Melbourne 185 Exhibition Street.
- Belgiujo:** Belga Esperanto Instituto *Antwerpen*,  
Kleine Hondstraat 11. Poŝtkonto nro 1689.58.  
Flandra Esperanto-Instituto. *Kortrijk*,  
Marckesteenweg 18, poŝtkonto nro 3268.51.
- Britujo:** Alec Venture,  
Mitcham, (Surrey) 42 Hawkes Road.
- Bulgariujo:** Centra Librejo *Esperanto*,  
Sofia str. Maria Luiza 38
- Ceĥoslovakio:** Otto Skleněka, *Hradec-Kralové*,  
Poŝtkonto nro: Brno 110.8-8.
- Danujo:** Iosek, sro L. Friis *Aabyhøj*, Frodesvej 21.  
Poŝtkonto nro: 16295
- Estonio:** Helmi Dresen, *Tallinn*, Poŝtkest 6.
- Francujo:** Centra Esperanto Librejo  
Paris 6e, 11 rue de Sévres  
Poŝtkonto: Librairie Centrale Esp.-iste, Paris nro 19601.
- Germ: nujo:** Poŝtekkonto de Vilmos Bleier,  
Berlin 138084
- Hispanujo:** Ferdinand Montserrat,  
Barcelona, str. Provenza 75, 2—3a
- Italujo:** Itala Esperanto Centro *Milano*, Galleria  
Vittorio Emmanuele II. 92.  
Poŝtkonto: Milano, c/c postale 3/18715.
- Jugoslavujo:** Sudslava Esperanto Servo  
Zagreb, Primorska 11.  
La Suda Stelo *Slavonski Brod* Poŝtfako 44.
- Latvio:** Pocztowa Kasa Oszednosci Warszawa P. K. O.  
Riga Nr. 4.030 *surskribu:* Na konto Admin-  
istracja Literatura Mondo Krakow Nr 403 148.
- Nederlando:** Leo Moreau,  
Arnhem, Raapopsche weg 55. poŝtkonto nro 13848.
- Norvegiujo:** Norvega Ligo Esp.-ista, *Oslo*, Bergsliengata 11.
- Polujo:** Halina Weinstein, *Warszawa*, str. Leszno 99  
Izrael Lejzerowicz, *Lodz*, Skwerowa 20.  
\*Poŝtkonto nro W. P. K. O. 68273.
- Rumanujo:** Esp.-Instituto Rumana, *Cluj*, str. Bravilor 15
- Svedujo:** Förlagsföreningen Esperanto,  
Stockholm, r. Fack 698 Poŝtgirokonto nro 578
- Svisujo:** Nova Esperanto Grupo, sro Hans Pfiffner,  
ST. Gallen C. Gallusstrasse 34.  
Poŝtkonto: Nr. IX. 53.44.
- Japanujo:** Japana Esperanto Instituto  
Tokio, Hongoo—Motomiĉi I.  
Poŝtkonto: Tokio 11.325.
- Usono:** Amerika Esperanto-Instituto.  
Madison, (Wis.) Sherlok Hotel
- Aliaj landoj** ne menciitaj ĉi tie, bonvolu sendi poŝt-  
mandaton al Pocztowa Kasa Oszednosci. Krakow  
Nro 403148 Administracja Literatura Mondo.

## ESTONA ANTOLOGIO

### Unua parto

Sub la redaktado de

### HILDA DRESEN

kaj aliaj eminentaj tradukistoj  
estas nepre havinda libro por ĉiuj  
esperantistoj. — Prezo 2.50 sv.  
fr. aŭfrankite.



Havebla ĉe Literatura Mondo, Budapeŝto

La unua parto de la DIA KOMEDIO, la

# Infero

de Dante Alighieri

tradukita de

Kolomano Kalocsay

aperos

en aŭgusto. La verkon kaj tradukanton konas ĉiuj esperantistoj. Ni aldonu, ke laŭ lingvohistoria vidpunkto la tradukon reviziis BRUNO MIGLIORINI Akademiano kaj STEFANO LA COLLA L. K. kaj vi estos konvinkita, ke la traduko apartenas al la plej bonaj tradukoj de la mondfama verko.

En formato de 23,5×15,5 cm. sur senligna papero, 288 tekstopaĝoj kaj 15 tutpaĝaj ilustraĵoj de Deziderio Fáy entute 318 paĝoj.

La verko estos pli bela, pli impona ol Tragedio de l' Homo de Madách.

Prezo sv. fr. 8'80, broŝ. sv. fr. 11'—, bind. + 10% por sendkostoj.

Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj

donos la verkon al ĉiuj siaj anoj por sv. fr. 3'50 + 12% por sendkostoj, la 40 t. e kvardek % de ĝia vendoprezo, kiel eksterprograman libron en 1933-a jaro.

Mikaelo Sárosy kantas | Kolomano Kalocsay deklamas

sur la

## nova gramofondisko

nun preparata de Literatura Mondo. Por komencantoj la disko estos necesa instruilo de prononco, por progresantoj la moltona dolĉa kanto de Sárosy kaj la muzikoplena deklamo de Kalocsay donos neforgeseblan ĝuon. La disko pretiĝas el nova nerompebla materialo, kiu estas ludebla almenaŭ sepdekfoje per la kutimaj pingloj, sed ni povas liveri novspecajn pinglojn, per kiuj oni ludas ĝis ducentfojoj. Unu flanko ludas dum kvar kaj duona minutoj. Pri la prezo kaj aliaj detaloj ni donos precizajn informojn en la venonta Literatura Mondo.